

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

99-a jaro • n-ro 1191 (4) • **Aprilo 2006**


Esperanta muziko el Maŭricio kaj Madagaskaro

Novaj defioj
en scienco

Skizo pri la
itala literaturo

Mia esperantista
kredo

De Heronsgate
al Roterdamo



Esperanto Enhavo

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establit kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788
✉ revuo@stonline.sk;
revuo@esperanto.sk

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 36);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,50.

Anonctarifo (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL24PSTB0000378964
SWIFT: PSTB NL21)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando

☎ +31-10-436-1044,
✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@co.uea.org
TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

- 75 Malferme: Novaj defioj en scienc-teknika mondo (Amri Wandel).
76 Skizo pri la itala literaturo (Carlo Sarandrea kaj Silvia Garnero).
78 Stefan Maul en la maja Malferma Tago. Jam pli ol 1600 aliĝis al la Florenca UK.
79 La membraro de UEA en 2005.
80 Muziko: Progreso en Maŭricio kaj Madagaskaro (Stefano Keller).
81 Letero: Tio estas mia esperantista kredo (Claude Piron).
83 De Heronsgate al Roterdamo: Tiny Goldsmith kaj la domo de UEA (Johano Rapley).
85 Esperanto en radio: Radio 3ZZZ Melburno. Pola Radio elsendas Esperante por la monda elito.
86 Recenzoj: Laŭlum pri Muroj de miljaroj / Ie en Ĉinio. Sten Johansson pri *Intimaj temoj en la Esperanto-beletro*.
87 ... P.V. Ranganayakulu pri *Tradicia ĉina dieto*. Sten Johansson pri *La fotoalbumo 2*.
88 Andreas Künzli pri *Esperantologio / Esperanto Studies*, n-ro 3. La angulo de EVA: El: „Ĉu en tombejo?“ (Edmond Privat).
89 Laste Aperis. Katalogo de artikoloj.
90 Loke-Fake-Persone: Pollando (P. Jegorovas). Francio (L. Marin). Italio (N. Rossi). Ĉinio (Wu Guojiang). Hispanio (S. Mulas Gallego).
91 Oficiala Informilo. Afrika Oficejo kun nova teamo en nova ejo.
92 Tra la mondo: Verda turismo en Himalajoj (Razen Manandhar). Esperanto en la Muzea Nokto de Roterdamo (Osmo Buller).
93 Tradicia litovia librofoiro (Povilas Jegorovas). „Miaj kripoj“ en Triesto (M. Belošević).
94 Malferma Tago.

KOVRILPAĜE: En Hinda Oceano, sur la insulo Maŭricio kaj la apuda Madagaskaro, famaj muzikistoj lernas Esperanton kaj prezentas en ĝi sian muzikon: Post Mary-Jane Gaspard ankaŭ la grupoj Nigra Por La Vivo kaj Ligilo prezentas kantojn en nia lingvo kaj konkursas en „Muzikume“ de Internacia Televido. Legu pli sur la p. 80.

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (Ĝenerala planado, eksteraj rilatoj, informado): D-ro Renato Corsetti,
Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina,
Italio; ☎ +39 06 957 57 13; ✉ +39 06 957 66 33; ✉ renato.corsetti@esperanto.org.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado): S-ino Claude Nourmont, 2 Om
Klappchen, LU-5682 Dalheim, Luksemburgio;
☎ +352 23 66 88 64; ✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala sekretario: S-ino Ulla Luin,
Myggdalsvägen 123, SE-135 42 Tyresö, Svedio;
☎ +46 (0)8 712 82 91; ✉ ulla.luin@esperanto.org.

Financo, administrado, TEJO: S-ino Ans
Bakker-ten Hagen, Kastelenstr. 231-II, NL-
1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎/✉ +31
(0)20 642 18 53; ✉ anstenhagen@hotmail.com.

Azia Agado, Amikoj de Esperanto: S-ro Yu

Tao, P.O. Kesto 825, CN-100037 Beijing, Ĉinio;
☎/✉ +86 (0)10 68995946; ✉ yu-tao@china.com.

Faka kaj scienca agado: Prof. Amri Wandel,
N-ro 767, IL-71908 Makabim, Israelo; ☎ +972
(0)8 926 44 62 (h); +972 (0)2 658 68 60 (of);
✉ +972 (0)2 658 44 61; ✉ amri@huji.ac.il.

Landa kaj Regiona Agado: S-ino Maritza
Gutiérrez González, Avellaneda 212, e/
Gertrudis y Josefina, CU-10500 Habana,
Kubo; ☎ +53 (7) 539201 (h); +53 (7) 404484
(of); ✉ +53 (7) 338729; ✉ mgglez@enet.cu.

Observanto de TEJO: S-ro Chuck Smith.

Observanto de ILEI: S-ro Radojica Petrović.

Speciala komisiito pri informado: D-ro Jukka
Pietiläinen, Soidintie 8 E 28, FI-00700 Helsinki,
Finnlando; ☎ +358 (9) 8036149 (h); ✉ +358
(3) 215 6248 (of); ✉ jukka.p@esperanto.fi.

Novaj defioj en scienc-teknika mondo

En la lastaj jaroj pli kaj pli videblas ke Esperanto progresas sur la kampo de scienco kaj tekniko. Internacia Kongresa Universitato (IKU) furoras kaj ĝiaj tekstoj estas libroforme kaj rete haveblaj. Akademio Internacia de la Sciencoj okazigas studsesiojn en novaj universitatoj kaj komunajn sesiojn kun IKU dum Universalaj Kongresoj. Sciencaj kaj teknikaj artikoloj en Esperanto abundas en la interreto: la Esperanta Vikipedio kreskas rapide kaj havas jam pli ol kvardek mil artikolojn kaj la Scienc-Teknika Esperanto-Biblioteko de *Eventoj* kunmetas rapide kreskantan datumbazon de malnovaj kaj novaj artikoloj kaj fakaj terminaroj. Ni klopodu bridi tiun momenton por vastigi la rolon de Esperanto en la scienc-teknika mondo.

Ni ofte prezentas la argumenton ke Esperanto povas trakti kaj esprimi ĉiujn aspektojn de la homa kulturo, same bone kiel aliaj lingvoj. Unu el la kampoj en kiu tiu defio estas plej granda, estas la scienco kaj tekniko, ĉar tiu kampo estas fronto de rapide kreskanta profesia terminaro kaj samtempe postulas vastan kaj rapidan informadon pri novaj rezultoj. En la fruaj tagoj de Esperanto tiun taskon surpris Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE), kiu venontjare festos centjaran jubileon, kaj ĝia bulteno *Internacia Scienca Revuo* kaj poste *Scienca Revuo*. En la revuo aperis sciencaj artikoloj – originale en Esperanto.

Ni ne pretendu ke Esperanto estas la internacia lingvo de la scienco, sed provu montri ke ĉiuj atingoj de scienca esploro kaj edukado povas esti reflektitaj per Esperanto. Tio fariĝis pli malfacila dum la epoko de la interreto. Ĝi tamen estas ankaŭ granda ŝanco por Esperanto, ĉar per la interreto ni povas facile kaj profesie montri al la mondo ke Esperanto serioze frontas tiun defion.

La nuntempa scienca mondo pli kaj pli uzas la anglan kiel laborlingvon por internaciaj kaj foje por naciaj aranĝoj. Tio povas malhelpi al la progreso de la scienco, kiu bezonas la liberan interŝanĝon de scioj kaj spertoj sur la persona nivelo. Sciencistoj el ne-angle-parolantaj landoj ofte spertas la lingvajn barojn kiam ili provas raporti pri sia esploro en internaciaj forumoj. Kontraŭe, universitata instruado kutime okazas en la nacia lingvo, kaj ekzistas do lingva breĉo inter la instrua kaj labora-konferenca niveloj. Esperanto povas solvi tiujn problemojn kiel internacia komunika lingvo.

Universitat-nivelaj kursoj de Esperanto okazas en pli ol cent universitatoj kaj institucioj de alta edukado en la mondo. Sed kiam ni parolas pri universitat-nivela instruado de scienco per Esperanto, elstarigas du institucioj kiuj emfazas la rolon de Esperanto en la scienco kaj en universitata instruado: Akademio Internacia de la Sciencoj kaj Internacia Kongresa Universitato.

La Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino (AIS, <http://www.ais-sanmarino.org/>) estas komuna kadro de fake elstaraj sciencistoj el la tuta mondo (proksimume 500 el dudeko da landoj) kiuj celas esplori kaj instrui sciencojn, teknikon kaj arton per Esperanto, kaj per plibonigo de la internacia komunikado kaj de interfaka kunlaborado. En la lasta jaro AIS okazigis studsesiojn en Sibiu (Rumanio), Karlovo (Bulgario), Komárno (Slovakio).

La Internacia Kongresa Universitato (IKU) estas serio de fakaj prelegoj, kiuj estas ĉiujare prezentataj dum la Universalaj Kongresoj de Esperanto. Ĝi ofertas al centoj da aŭskultantoj ĉirkaŭ dek prelegojn de spertuloj, profesoroj aŭ docentoj en siaj fakoj, pri temoj tre diversaj kiel lingvistiko, literaturo, etnologio, komputiko, astronomio kaj ekonomio. IKU okazas ĉiujare ekde 1951 (komence sub la nomo Internacia Somera Universitato, kaj ekde la UK en Brazilo en 1980 kun la nuna nomo).

En la naŭdekaj jaroj, kadre de la scienca kaj faka agado de UEA, mi iniciatis komunajn AIS- kaj IKU-sesiojn. En 1995 okazis en Tampere la unua komuna sesio. De tiam preskaŭ ĉiujare estis aranĝita komuna sesio sub la nomo AIS-IKU. Ĝi konsistas el tri kursoj, plilongigo de IKU-prelegoj al AIS-kurso de 3-4 lecionoj.





Skizo pri la itala literaturo

La ĝenerala karakterizo de la itala literaturo estas la lokaj kontribuoj al la komuna kultura riĉeco. Ekzistis dekomence tre vigla dialekta literatura produktado apud tiu pli klera. Pro la politika divido de Italio (kun regado de aliaj landoj) la lingvoj, kiujn uzis la popolo, restis relative malsamaj. Sed komuna estis la influo, kiun la latina lingvo havis sur la lingvon uzatan de la intelektuloj (malgranda elito). Tamen, pli kaj pli okazis la transiro el la dialektaj lingvoj al komuna skribita lingvo, kiu fontis el la dialekto de Florenco, la urbo de nia ĉi-jara UK.

Kelkaj lingvistoj datas la aperon de la lingvo, kiun oni parolas en Italio, en la 10-a jc. p. K. En la jaro 960 en notaria akto oni transskribas frazeton de atestanto, kiu tiel parolis: *Sao ko kelle terre, per kelle fini que ki contene, trenta anni le possette parte sancti Benedicti...* (en la hodiaŭ itala lingvo ĝi tekstus: *So che quelle terre, per quei confini che qui sono descritti, le possedette per trent'anni la parte di S. Benedetto = mi scias, ke tiujn terojn, laŭ tiuj limoj kiujn oni ĉi tie priskribas, posedis dum 30 jaroj la partio de sankta Benedikto*).

Ĉi tiu frazeto estas do la unua ekzemplo en Italio de la „transformo” de la latina lingvo en la t.n. „popolajn lingvojn” (latinidajn).

Sed el strikte kronologia vidpunkto la unua itala literatura dokumento estas *La kantiko de la Kreitajoj* de Sankta Francisko el Asizo (jaro 1225). Aldone al ĉiuj aliaj tiutempaj esprimoj estas notinda la tiel nomata kaj fama „Sicilia Skolo”, kiu komenciĝis ĉe la kortego de Frederiko la 2-a. La verkistoj pritrakis ĉefe amtemarojn, inspirante sin je la provencaj trobadoroj (tiom ke oni parolas pri „okcitan-devena” poezio). Unu el la verkistoj estas Cielo d'Alcamo:

El „Kontrasto inter amanto kaj damo”

I.

Amanto: Parfuma, freŝa rozo, kiu somere floras,
la damoj, ĉu fraŭlinoj, ĉu edzinoj vin favoras;
mildigu mian ardon, se iom vi bonkoras;
al mi ne eblas plu trankvilo ia,
ĉar mi nur pensas vin, ho damo mia.

II.

Damo: Se vi pri mi ĝeniĝas, vi estas sen prudento:
se vi la maron plugus, kaj semus en la vento,
prenus la tutan riĉon de tiu ĉi jarcento
vi ja ne povus min posedi monde;
mi tondus miajn harojn pli volonte.

(Trad. Enrico Dondi)

Poste, en la dua duono de la 13-a jarcento la ĉefa sidejo de la itala kulturo moviĝis al centra Italujo, kiu estis samtempe politika kaj ekonomia potenco.

Je la komenco de la 14-a jarcento datiĝas la unua prilingva teoria prilaboro pere de la verkaro de Dante Alighieri. Li mem, en sia verko *De Vulgari Eloquencia* (*Pri la elokventeco en popola idiomato*) denove sekvas pensojn de antaŭaj kleruloj kaj substrekas la neceson krei komunan kulturan lingvon, per kiu ĉiuj italoj povu esprimi novan sentokapablon. Dante mem partoprenis en la unua plena formulado de tiu kultura lingvo per sia ĉefverko *La Dia Komedio*, vere grava poemo imagita kiel vojaĝo de la poeto tra la transa mondo (*Infero*, *Purgatorio* kaj *Paradizo*). Li ankaŭ verkis rimojn, kiuj respegulas la novan stilon, en kiu interalie la amo fariĝas ilo por spirita plialtiĝo.

El: „Aperas jen, modeste kaj ĝentile”


Aperas jen, modeste kaj ĝentile,
Estrino mia kun la gest' saluta;
tremante ĉiu lango iĝas muta,
en bril' okuloj klinas sin humile.

Sentante laŭdojn, iras ŝi trankvile,
de l' honesteco investite tuta,
sur teron kvazaŭ ĉielalto kruta
fluigis mirindajon perflugile.

Kaj ŝi afable donas por admiroj
dolĉecon tian per okul' al koro,
ke tiu nur ĝin konas, kiu provas;

de ŝiaj lipoj sin karese movas
spireto ama, plena de favoro,
ke diras al anim': „Al mi, sopiroj!”

(Trad. Antoni Grabowski)



Kontraŭ la “danteca” stilo kaj vivmaniero oni kontraŭmetis literaturon kiu celis igi la verkistojn io tute apartigita disde la socia vivo. Tiaj estis, ekzemple, F. Petrarca (*La Kantaro*) kaj G. Boccaccio (*La Dekameron*).

Ĉe rememor’ pri ŝi, jam ĉiel-glora

Ĉe rememor’ pri ŝi, jam ĉiel-glora,
mildrigarda, kun klino de l’ orhela
kapet’, kaj pri l’ modesta kaj angela
voĉ’ al mi tiel dolĉa kaj dolora:

tre miras mi, ke vivas mi ankoraŭ.
Ja mi ne vivus, se ŝi – ĉu pli bela
aŭ digna, restu dube – savakcela
ne venus al mi en la hor’ aŭrora.

(Trad. Kálmán Kalocsay)

La 15-a jarcento, pere de Humanismo, preterpasis la disdividon inter la civila vivo kaj la spiritualeco: oni revalorigis la klasikan tradicion. La politika repaciĝo favoris la riĉiĝon de la literaturaj ĝenroj: estiĝas la lirismo, la poemoj pri la noblaj kavaliroj, la romanoj pri la kampula vivo. Unu el tiuj verkistoj estis Angelo Poliziano:

El: „Plendo de Orfeo“

Do ploru ni, ho liro sen espero,
ne taŭgas plu l’ antaŭa kanto bela:
ploru, dum giras la ĉiela sfero,
kaj je ĉi ploro cedu Filomela.
Ho kruda sort’, ho mar’, ĉielo, tero,
kiel rezisti je dolor’ tiela?
Ho Eŭridice bela, vivo mia,
sen vi ne eblas plu ekzisto ia.

Mi devas iri la tartaran pordon,
por tie sube kompatemon trovi;
aŭ per la larma vers’ la duran sorton,
ho dolĉa citro, eble turni povi;
por eble kompatema igi Morton,
ĉar ni, kantante, igis ŝtonojn movi,
cervon kaj tigron kune ni kolektis,
arbarojn tiris, fluojn fordirektis.

(Trad. Enrico Dondi)

La Renesanco, en la 16-a jarcento, disvolviĝis kiel kultura movado por kontraŭmeti al la diserigo de la civila vivo literaturan riĉaĵon tute originalan kaj regulan; la ĉefverkoj de tiu ĉi historia periodo estas: *Rolando Furioza* de L. Ariosto, *La Princo* de N. Machiavelli kaj *Jeruzalemo Liberigita* de T. Tasso.

Dum la 17-a jarcento la Baroka literaturo komencis ŝati la ekstravagancan kaj aŭdacan lingvan eksperimentadon. Dum la scienca intereso kontribuis al la enkonduko en la literaturajn ĝenrojn ankaŭ de la sciencaj tekstoj en la itala (la plej elstara reprezentanto de tio estas Galileo Galilei), estiĝis redeklaroj pri la delikata konkreco de la homaj sentoj: en tiu kunludis la agado de la poetoj apartenantaj al la „Akademio de Arkadio”. Por ili, Arkadio estis la ideala patrujo de la tradicia bukolika poezio kaj de la melodramo. Pri la


temoj pli ligitaj kun la realo atentis la filozofiaj verkoj de G. B. Vico.

Meze de la 18-a jarcento la ekonomia revigliĝo kaj la transformiĝo de la itala politika vivo influis ankaŭ literaturon. La lombardiaj kaj napolaj „kleristoj” igis pli „esenca” la prozan lingvon; la teatraĵoj esprimis la sentojn de la tiama komerca burĝa klaso, kiel oni povas konstati en la verkoj de C. Goldoni, ekzemple *La Gastejstrino* (kiu, cetere, estas verkita en la dialekto de Venecio).

En la unua duono de la 19-a jarcento la „Romantikismo”, naskiĝinta en Germanio, trapenetas la italan literaturon kaj samtempe ekfloras la „prihistoria romano”, kies ĉefverko estas sendube *La Gefianĉoj* de A. Manzoni (ĵus tradukita en Esperanto, v. Laste Aperis, p. 90).

El „La gefianĉoj”

Tiu el la du branĉoj de la lago de Como, kiu estas turnita suden, inter du seninterrompaj monto-ĉenoj, tute sinua kaj golfa laŭ la elstaro aŭ valiĝo de ĉi-lastaj, preskaŭ abrupte stretiĝas kaj akiras fluon kaj formon de rivero, inter promontoro dekstre kaj vasta plaĝo aliflanke; kaj la ponto, tie kunliganta la du bordojn, ŝajnas perceptigi pli klare al la okulo tiun ŝanĝon, kaj marki la punkton, kie la lago ĉesas kaj rivero Adda rekomenciĝas, por nomiĝi denove lago tie, kie la bordoj, denove distancaj, la akvon etendas kaj kvietigas, formante denovajn sinuojn kaj golfojn. La plaĝo, formite per la aluvioj de tri grandaj torentoj, deklivas sur du intertuŝaj montoj: la unua nomata San Martino, kaj la dua, per Lombarda dirmaniero, Resegone, pro ties multaj sinsekvaj pintoj, kiuj vere similigas ĝin al segilo, tiel ke ĉia rigardanto, se li staras fronte, ekzemple sur la nordaj muregoj de Milano, tuj el tia karakterizo distingas ĝin, en tiu longa kaj vasta altaĵaro, elinter ceteraj montoj kun nomoj malpli konataj kaj formoj pli ordinaj. La borda deklivo longe alsupras nekruta kaj kontinua; poste ĝi abruptas je elstarajoj kaj valetoj, krutaĵoj kaj plataĵoj, laŭ la skeleto de la du montoj kaj la erozio de la akvoj. La monto-bazo, sulkita de la elfluejoj de l’ torentoj, estas preskaŭ tute grua kaj ŝtona; la resto konsistas el kampoj kaj vitejoj, kun disaj domaroj, vilaĝoj kaj kampar-domoj; dise arbaroj, kiuj pluetendiĝas surmonten. Lecco, kiu estas la ĉefa el tiuj lokoj, kaj donas nomon al la tuta teritorio, kuŝas ne tre distance de la ponto, ĉe l’ bordo de la lago, ĝi eĉ troviĝas parte en la lago mem, kiam ĝi inundas; nuntempe ĝi estas urbeto, survoje fariĝi urbo. En la epoko, kiam okazis la eventoj, kiujn ni komencas rakonti, tiu vilaĝego, jam konsiderinda, estis ankaŭ kastelhava, kaj tial ĝi havis la honoron gastigi komandanton, kaj la avantaĝon posedi konstantan



75 Tiaj kursoj permesas pli profundan traktadon de temo kaj donas al partoprenantoj la okazon fari ekzamenon kaj ricevi ateston de AIS. En 2005 estis subskribita nova kontrakto inter UEA kaj AIS pri la okazigo de komunaj kongresaj AIS/IKU-sesioj.

Por havi presitan dokumenton de la prelegoj mi proponis eldoni la prelegojn kiel broŝuron antaŭ la kongreso. En la UK en Adelaido (1997) unuafoje aperis broŝuro de la IKU-tekstoj. De tiam UEA regule eldonas la IKU-prelegojn broŝurforme dum la UK, kaj la tiel nomata IKU-libro fariĝis furora vendado en la kongresa libroservo. Nacilingvaj resumoj de la prelegoj ebligas utiligi la IKU-libron por eksteraj rilatoj dum kaj post la kongreso. Lastjare la IKU-dokumentado plue progresis, kiam la IKU-libro de 2005 aperis ankaŭ en la interreto. Poste aldoniĝis du antaŭaj IKU-libroj (de 1998 kaj 2002), nun videblaj ĉe <http://www.uea.org/dokumentoj/index.html>. Plia signo pri la kreskanta prestiĝo kaj populareco de IKU estas la multiĝo de preleg-proponoj: por la IKU en Litovio estis dek ok proponoj, kaj por la Florenca IKU alvenis kvardek.

Ni povas uzi tiun universitat-nivelan aktivecon por disvastigi la rekonon de Esperanto en scienc-rilataj internaciaj forumoj kiel Unesko kaj neregistaraj organizaĵoj kiel Internacia Asocio de Universitatoj (IAU). En 2000 AIS estis akceptita kiel membro en la prestiĝa asocio de Internacia Asocio de Universitataj Profesoroj kaj Lekciistoj (IAUPL). Nuntempe okazas kontaktoj inter UEA kaj IAU por rekonu AIS kaj IKU kiel universitatajn aranĝojn.

Unu el la plej gravaj manifestiĝoj de la potencialo de Esperanto estas la verkado kaj tradukado de sciencaj kaj teknikaj artikoloj en Esperanto. La interreto estas potenca rimedo por tion fari.

Unu kanalo kiun oni lastatempe multe uzas por tiu celo estas Vikipedio – multlingva libera reta enciklopedio. La Esperanta vikipedio (<http://eo.wikipedia.org/wiki/>), kiu ekzistas de 2001, enhavas jam pli ol 40 000 artikolojn kaj plurajn sciencajn kaj teknikajn materialojn. Tre valora iniciato sur la tereno de retaj

artikoloj estas la Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko ĉe la retejo de *Eventoj* (STEB, <http://www.eventoj.hu/steb/>). STEB klopodas kolekti kaj re-disponigi sciencajn kaj teknikajn artikolojn en tre diversaj fakoj de natursciencoj, juro, medicino, ekonomiko kaj aliaj. STEB provizas per kreskanta datumbazo de malnovaj kaj novaj artikoloj kaj fakaj terminaroj kaj povas servi kiel kerno de scienca kaj teknika eldonado en Esperanto.

Alia grava tereno estas la prilaboro de fakaj terminoj. Pro la rapida progreso de scienco kaj tekniko en la lastaj jaroj tio estas eĉ pli granda defio por Esperanto. Kadre de la Akademio de Esperanto aktivas la sekcio pri faka lingvo. Dum la UK ofte okazas la Terminologia Forumo. La Terminologia Esperanto-Centro (TEC), kiu estis fondita en 1981, havas nun propran retpaĝon (<http://esperanto.net/tec/>). Dekoj da fakaj terminaroj en Esperanto aperis dum la jaroj kaj multaj estas rete haveblaj (ekzemple en la retejo de STEB ĉi-supre). Ni devas tamen konservi kaj aktualigi nian terminaran laboron kaj adapti ĝin al modernaj normoj kaj normigo. Ekzemple, eblas tiucele kontakti kaj kunlabori kun INFOTERM, la internacia informcentro por terminologio.

Kun rigardo al la estonteco, la Esperanto-kulturo evoluas ankaŭ en la direkto de scienco kaj tekniko, kvankam eble malpli intense ol sur la beletra kampo. Por garantii ke Esperanto ne stagnu en la scienca kaj faka medioj, ni devas daŭrigi kaj pli intensigi la verkadon de faka literaturo en Esperanto, ĉu originala ĉu tradukita, kaj ĝisdatigi la fakan lingvon. Tre grava tasko estas publikigi tiujn entreprenojn sur la interreto, kaj por propra utiligo en la Esperanto-komunumo kaj por ekstera informado. Interne de la movado ni daŭrigu la popularigon de profesiaj kaj scienc-popularaj prelegoj en niaj kongresoj kaj kunvenoj. Ekster la movado ni provu informi kaj kunlabori kun ne-Esperantaj naciaj kaj internaciaj organizaĵoj pri faka kaj scienca agado kaj alta edukado.

Amri Wandel

Stefan Maul en la maja Malferma Tago

Stefan Maul, konata Esperanta ĵurnalisto kaj redaktoro de la magazino *Monato*, estos la ĉefa gasto en la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 13-an de majo.

Maul prezentos dum la Tago sian ĵus aperintan verkon *El verva vivo ĵurnalista*, en kiu li interalie klopodas klarigi, kial li estas kaj restas konvinkita adepto de la ideo de L.L. Zamenhof.

Nekutiman prelegon faros profesoro Ruĝnazul', por kiu la elpaŝo en la maja Malferma Tago estos premiero en tiu ĉi populara aranĝo, kiu okazos jam por la 24-a fojo. Premieran prezenton spertos ankaŭ la filmo de Petro Baláž pri la pasintnovembra Malferma Tago kaj pri la vivo en la Centra

Oficejo. Oni montros krome filmon pri la Esperanto-rilata kvizo en la ĉi-jara Muzea Nokto de Roterdamo.

Kiel tradicie, la vizitantoj povos profiti de rabatoj en la libroservo kaj gajni esperantaĵojn en senpaga loterio. Kafo kaj teo, ankaŭ senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La Malferma Tago daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.



Jam pli ol 1600 aliĝis al la Florenca UK

Ĝis la 22-a de marto entute 1629 aliĝintoj el 57 landoj estis registritaj por la 91-a Universala Kongreso en Florenco (29 julio – 5 aŭgusto 2006).

Kun 246 aliĝoj la najbara Francio plu tenas malantaŭ si la gastigantan landon Italio, kiu liveris 211 aliĝojn. Pri la tria loko rivalas Germanio kaj Japanio kun respektive 140 kaj 132 aliĝintoj. La limon de 100 jam baldaŭ transpasos Pollando, kiu nun reprezentigas per 96 aliĝintoj. Sekvas Rusio (60), Belgio (55), Brazilo (52), Hispanio (49), Nederlando (41), Britio (39), Litovio (37), Svedio (35), Danio kaj Usono (po 33), Kroatio kaj Svislando (po 30), Ĉeĥio kaj Hungario (po 28), Korea Respubliko (24), Israelo (23), kaj Serbio kaj Montenegro (22).

LA MEMBRARO DE UEA EN 2005

Lando	AM	IM	Sume	Lando	AM	IM	Sume
Algerio	0	2	2	Kroatio	266	65	331
Albanio	0	12	12	Kubo	100	45	145
Andoro	0	1	1	Kuvajto	0	1	1
Argentino	89	29	118	Latvio	85	24	109
Armenio	25	10	35	Libano	0	3	3
Aŭstralio	170	62	232	Litovio	100	117	217
Aŭstrio	40	45	85	Luksemburgio	93	12	105
Azerbajĝano	0	5	5	Madagaskaro	0	10	10
Barejno	0	1	1	Makedonio	25	8	33
Belgio	559	171	730	Malajzio	0	3	3
Belizo	0	1	1	Malio	0	1	1
Benino	195	11	206	Malto	35	3	38
Bjelorusio	0	10	10	Maroko	0	2	2
Bolivio	0	1	1	Meksiko	8	18	26
Bosnio-Hercegovino	97	19	116	Moldavio	0	3	3
Brazilo	335	365	700	Mongolio	0	7	7
Britio	419	169	588	Nederlando	271	260	531
Bulgario	140	49	189	Nepalo	0	14	14
Burundio	0	8	8	Niĝerio	90	10	100
Ĉadio	0	1	1	Niĝerlando	0	5	5
Ĉeĥio	129	96	225	Nikaragvo	0	3	3
Ĉilio	25	6	31	Norvegio	182	49	231
Ĉinio	1050	131	1181	Nov-Zelando	35	30	65
– Honkongo	0	3	3	Omano	0	1	1
– Tajvano	0	2	2	Pakistano	100	11	111
Danio	127	87	214	Panamo	0	1	1
Dominika Resp.	0	3	3	Paragvajo	0	4	4
Ebura Bordo	25	1	26	Peruo	25	6	31
Egiptio	0	1	1	Pollando	500	170	670
Ekvadoro	0	1	1	Portugalia	95	10	105
Estonio	78	34	112	Ruando	0	2	2
Finnlando	194	176	370	Rumanio	79	35	114
Francio	465	665	1130	Rusio	95	239	334
Ganao	0	7	7	Senegalio	0	1	1
Germanio	781	568	1349	Serbio-Montenegro	72	31	103
Greklando	97	16	113	Slovakio	72	31	103
Gvatemalo	0	2	2	Slovenio	100	22	122
Haitio	0	1	1	Srilanko	0	2	2
Hinda Unio	100	19	119	Sud-Afriko	29	6	35
Hispanio	194	154	348	Svedio	359	188	547
Honduro	0	2	2	Svislando	82	98	180
Hungario	134	112	246	Taĝikio	0	2	2
Indonezio	0	1	1	Tajlando	0	1	1
Irano	80	44	124	Tanzanio	0	11	11
Irlando	50	14	64	Togolando	268	36	304
Islando	50	28	78	Tunizio	0	2	2
Israelo	89	79	168	Turkio	0	1	1
Italio	761	223	984	Ukrainio	154	45	199
Japanio	1041	401	1442	Un. Arab. Emiratoj	0	1	1
Jordanio	0	1	1	Urugvajo	25	8	33
Kamerunio	0	5	5	Usono	263	363	626
Kanado	103	71	174	Uzbekio	0	4	4
Kartvelio	25	1	26	Venezuelo	21	12	33
Kazaĥio	0	4	4	Vjetnamio	535	46	581
Kenjo	0	1	1	Zimbabvo	0	2	2
Kolombio	93	9	102		—	—	—
Komoroj	0	1	1				
Kongo (Dem. Resp.)	25	41	66				
Korea Resp.	279	34	313				
Kostariko	25	5	30				

113 landoj 12253 6107 18360

LAŬKATEGORIA RESUMO DE LA MEMBRO-STATISTIKO

Kategorio	2004	2005
Membro-Gvidlibro	403	388
Membro-Jarlibro	1226	1408
Membro-Abonanto	2863	2842
Juna Membro-Jarlibro	265	361
Juna Membro-Abonanto	136	130
Dumviva Membro	823	821
Juna Dumviva Membro	25	29
Dumviva Membro-Jarlibro	33	42
Juna Dumviva Membro-Jarlibro	10	13
Honora Membro	62	65
Honora Patrono	10	8
INDIVIDUAJ MEMBROJ	5856	6107
Aligitaj membroj	10308	10179
Junaj aligitaj membroj	1840	2074
MEMBROJ ENTUTE	18004	18360
Dumvivaj Patronoj	3	3
Societo Zamenhof	138	143
Abonoj <i>Esperanto</i>	157	159
Kolektivaj ab. <i>Esperanto</i>	42	30
Abonoj <i>Kontakto</i>	246	244
Kolektivaj ab. <i>Kontakto</i>	60	60
Patronoj de TEJO	76	64
Dumvivaj Patr. de TEJO	21	21
KOTIZOJ ENTUTE	18747	19084

Por la tria sinsekva jaro kreskis la membraro en 2005. Estis 251 individuaj membroj (IM) kaj 105 aligitaj membroj (AM) pli ol en 2004. Sekve la du branĉoj de la membraro kreskis resp. 4,3% kaj 0,9%.

En 2005 la membraro iom plijuniĝis. IM de TEJO kreskis el 436 al 533 (+22,2%) kaj la junaj AM plimultiĝis el 1840 al 2074 (+12,7%). Sekve la TEJO-porcio kreskis el 7,4% al 8,7% inter IM kaj el 15,1% al 16,9% inter AM.

La revuo *Esperanto* havis 4084 abonantojn. Tiu nombro iom malkreskis (-34), ĉar *Fondaĵo Canuto* pagis 45 MA-kotizojn malpli ol en 2004 (671 anst. 716). Por denove plimultiĝi “kanutanojn”, pli da donacoj al tiu fondaĵo estas bezonataj!

Ĝojigas la rekresko de abonoj al *Kontakto* el 839 en 2004 al 922. TEJO bedaŭrinde nombris malpli da patronoj (64 anstataŭ 76), sed Societo Zamenhof venkis sian multjaran malkreskon, kunigante 143 mecenatojn (138 en 2004). ob

Progreso en Maŭricio kaj Madagaskaro

Sur Maŭricio, unu el la insuloj de Maskarenoj en Hinda Oceano, kaj sur la apuda Madagaskaro, famaj muzikistoj lernas Esperanton kaj klopodas konigi al la mondo, pere de la internacia lingvo, siajn kulturon kaj muzikajn stilojn.

Mary-Jane Gaspard inaŭguris la vojon al Esperanto por maŭricianoj en la jaro 2005. Ŝia kanto laŭ la stilo de segao «Nur Amiko» estas tre sukcesa ne nur en Esperantio. La eŭropa publiko povis malkovri ŝian talenton dancistinan kaj kantistinon dum la pasinta jarfino en Svislando, Francio kaj Belgio, okaze de la unua turneo de la juna kantistino ekster la Hinda Oceano. Tiam oni aŭdis ŝin la unuan fojon publike kanti en Esperanto.

Post ŝia apero sur la artistia scenejo de la insulo kun la „ekzota lingvo“, okazis kelkaj radiointervjuoj kun la produktanto de la disko de Mary-Jane, Madir Productions (www.madir-music.com, kiu havas Esperanto-fakon) kaj lokaj ĵurnaloj kaj magazinoj raportis pri la evento. Oni ne devis atendi longe por ekscii pri aliaj muzikistoj kaj kantistoj, kiuj ekinteresiĝas pri tiu ilo de interpopola interŝanĝo.

Kaj jen alvenas fulmrapide la saminsula grupo Nigra Por La Vivo (Negro Pou La Vi), kiu alportas la stilon regeo en la muzikan mondon de Esperanto. Ilia kanto «La Persisto» estas la plej freŝa produktaĵo de tiu

etno-muzika linio, kies impresario estas Stefano Keller, la motoro de la Agado Esperanto en Maŭricio. Nigra Por La Vivo kantas pri amo, paco kaj respekto. La mesaĝo estas eduka, la muziko de la grupo estas ŝatata de multaj. Ne estas hazarde ke ili renkontis Esperanton kaj alproprigis ĝin. Nigra Por La Vivo estas fama grupo kiu jam produktis kvin albumojn kaj estis nomumita por la premio *Kora Awards* en Sud-Afriko. Fine de januaro 2006 ili koncertis en Svislando.

La ondoj de tiu deziro malkovrigi sian kulturon al la mondo pere de la interetna komunikilo jam atingis ankaŭ la najbaran insullandon Madagaskaro. Tie Esperanto havas siajn uzantojn jam de longe, sed en la lokan muzikan medion ĝi alvenas nur nuntempe. La grupo, kiu unue prezentas la malagasajn muzikstilon kaj mondon al la esperantistaro, nomiĝas Ligilo (*Trait d'Union*). Per sia kanto «Granda Festo» tiu familio (Ligilo konsistas el membroj de la sama familio) deziras veki emon en la aŭskultantaro por vizito al Madagaskaro. Jen ankoraŭ alia nova muzika stilo por la Esperanta scenejo: la salegio malagasa. Same el la kolekto etno-muzika.

„Nur Amiko“, „La Persisto“ kaj „Granda



Festo“ estas la tri muzikaĵoj kiuj reprezentos la regionon de Afriko kaj Hinda Oceano inter la kandidatoj de la konkurso La Verda Stelo, kiun organizas Internacia Televido kadre de la programo Muzikume.

Se vi volas voĉdone apogi viajn preferatajn kantistojn kaj muzikistojn, bonvolu viziti la retejon de ITV ĉe <http://internacia.tv>.

Se vi deziras spekti kaj aŭskulti la muzikon per videofilmoj, bonvolu viziti la retpaĝon: www.studio-pro.ch/esperanto-muziko.html (gratulmesaĝoj, bildkartoj, instigoj aŭ invitoj koncerti bonvenas). Esperantistoj, dezirantaj vojaĝi al Maŭricio aŭ alia insulo en Hinda Oceano (por ferii, prelegi aŭ instrui), bonvolu skribi al:

esperanto-en-mauricio@kontakto.info

(Laŭ informoj de Stefano Keller)



Tio estas mia esperantista kredo

Ĉar verŝajne ne multaj kundividis mian opinion, mi prezentos ĝin ĉi tie. Ke ĝi estas nekutima, tio eble dependas de mia profesio, pro kiu mi ĉiutage rilatas kun la nekonscia parto de la homoj.

Mi konstatas, ke mi ne povas ne agi por kaj pri Esperanto. Ne gravas, ĉu ĉe la supro, ĉe la malsupro, ĉe tiu flanko (verkante), ĉe tiu alia flanko (babilante en la lingvo). Mi povas pravigi mian nepran poresperantan agemon per ĉiaspekaj raciaj motivoj: idealismo, amo al justeco, intereso pri lingvoj, intereso pri foraj landoj kaj ties kulturoj, deziro kaj plezuro aparteni al socio alitipa ol la ĝenerala socio kaj el tio ĉerpi mem-altigan senton pri unikeco, ktp. Sed mi scias, ke tiuj pravigoj estas postaj al la agemo. Mi sentas la agemon antaŭ ol interesiĝi pri ĝiaj eblaj kaŭzoj, kaj, iel, pli forta ol ili. Tiuj pravigoj do estas provoj atribui racian kaŭzon al io, kies veran kaŭzon mi ne konas, nek komprenas.

Mi konas multajn esperantistojn, kiuj havas similan nepovon seniĝi je la bezono agi por aŭ pri Esperanto. Se mi, kaj tiuj aliaj, funkcias malbone en la cetera vivo kaj estus malfeliĉaj, la plej racia konkludo estus: tio estas ia formo de mensa malsano (obsedo/agtrudo). Sed, kiam mi devis ricevi oficialan permeson povi praktiki psikoterapion, mia mensa stato estis kontrolita de fakuloj, kiuj deklaris min mense sana (mi jam havis tiun internan devon agi pri Esperanto tiutempe: la plej multaj el vi scias, ke mi lernis Esperanton kiel infano).

Krome, mi estas unu el la plej feliĉaj personoj, kiujn mi konas, kaj mi funkcias normale en la vivo, kun multaj fuŝoj, jes ja, sed ne pli ol la personoj, kiujn oni ĝenerale rigardas normalaj. Inter la aliaj, kiuj, same kiel mi, ne povas ne esperantumi, kelkaj prezentas tiajn eksternormajn sintenojn, ke eblus klasi ilin inter mensmalsanulojn, sed multaj – la plimulto – tute ne. Ilia mensa funkciado estas, laŭ psikiatria kriterioj, normala. Oni do ne klarigu la aferon per mensa malsano.

Ĉu temas pri simpla ŝatokupo? Ne tiel ni sentas la aferon. Ni sentas ĝin kiel ion ege pli gravan. Homoj, kiuj ne povas ne spekti ĉiujn futbalmatĉojn, aŭ ne iri monludi en kazino, ne havas senton pri devo. Ili sentas, ke tion ili faras por si, kaj libere elektis. Ni sentas la aferon alie: plenumenda tasko. Ni ne havas

la impreson, ke ni faras tion por ni. Kompreneble, tio povus esti simpla iluzio, (nekonscia) sintrompo por havigi al si gravecon, aŭ por klarigi ion, kies veran kaŭzon ni ne sukcesas trovi.

Sed povas esti ankaŭ, ke, iel, nin puŝas historio, t.e. kolektivaj fortoj superaj al ni kiel individuoj, fortoj kiuj iel igas la homaron iri ne en iu ajn direkto, sed (treege longperspektive) al io pli bona, pli bela, pli akceptebla, pli justa. Ĉu ne agis similaj fortoj por forigi sklavecon, atingi pli egalan traktadon inter viroj kaj virinoj, estigi respekton al infanoj, toleremon pri religio kaj ideologio, atenti la bezonojn de la malpli bonŝanca parto de la socio, ktp? En neniu el tiuj kampoj la celoj estas centprocente atingitaj, multego mankas ĝis tio. Tamen la progresoj estas enormaj kompare kun la situacio en la tempo, ekzemple, de la romia imperio.

Mi sentas min ilo de tiaj socihistoriaj fortoj. Libera ilo, certe. Mi povis diri „ne“, kiam Esperanto eniris mian vivon, kaj – tiel mi sentas la aferon, eĉ se tio aperas al vi vere tro fantazia – „elektis“ min unu el siaj agantoj. Sed mi diris „jes“ kaj tion neniam bedaŭris, ĉar mi ricevis de Esperanto multegon bonan kaj ĝuatan. Mia sento estas, ke mi naĝas aŭ boatas laŭ unu aparta fluo en la giganta fluaro de historio, kvankam la grandega plimulto el la homaro (kaj el la esperantistaro) tiun flueton ne vidas. Sed tio estas normala. Neniam la komencaj fluetoj estas videblaj al la fakuloj kaj al la publiko. Kiu povis pensi, komence, kiom gravaj fariĝos budhismo aŭ kristismo, aŭ la sociala aliro al la socia vivo, aŭ la lingvo de angloj kaj saksoj?

Tial, al mi ne tiom gravas la demando, ĉu ni agu je tiu aŭ alia nivelo, aŭ kion ni devas aŭ povas fari. Ĉiam estos sufiĉe da homoj por fari ion, kaj progresigi la aferon, ĉar ĉiam estos homoj, kiuj ne povos ne agi, kaj tio sufiĉos por teni la lingvon viva sufiĉe longe, por ke iutage la homaro konsciu pri ĝia boneco kaj ĝi rapide disvastiĝu, ĉu pro iu kompreno ĉe la malsupro, ĉu pro iu saĝa decido en iu prestiĝa supro, ĉu pro tute neracia ekmodo, ĉu pro katastrofa socia konflikto, kiu estigos fortegajn ribelajn

sentojn kontraŭ la angla lingvo, eble asimilita al neakceptebla ekonomia aroganteco, ĉu pro io tute neimagebla nun.

Por mi, Esperanto estas tiel forta, ke eĉ se malaperus ĉiuj esperantistoj kaj 90 elcentoj el la tekstoj pri kaj en la lingvo, post ia tempo ĝi reviviĝus. Retrovus ĝin iu studento aŭ ĵurnalisto en biblioteko, kaj ekmirus pri ĝi, kaj rakontus pri ĝi, kaj ĝi fariĝus laŭmoda. Pardonu la longan paroladon, sed, nu, tio estas mia esperantista kredo.

Klaŭdjo (Claude Piron)



garnizonon el hispanaj soldatoj, kiuj instruis ĉastecon al la lokaj knabinoj kaj virinoj, kaj karesis de tempo al tempo la dorson de kelkaj edzoj, de kelkaj patroj; krome, ĉe la somerfino, neniam ili neglektis disiri tra l' vitejoj, por maldensigi la vinberojn, per tio mildigante al la kamparanoj la penojn de vinber-rikolto.

Trad. Battista Cadei

Post la itala unuiĝo naskiĝis la realisma prozo reprezentita ĉefe de la verisma romano de G. Verga (ekzemple: *I Malavoglia*, ankaŭ ĉi tiu ĵus tradukita en Esperanton), de M. Serao kaj de G. Deledda (ekzemple *Kanoj en la vento*). Fine de la 19-a jarcento aperas la poemoj de G. Pascoli, kiuj antaŭanoncis la Dekadencismon de la poetoj de la 20-a jarcento.

Alia menciinda poeto estas G. Carducci, kies poemado revenas al la klasika stilo, ne nur pro la pritraktitaj temoj sed ankaŭ pro la preciza uzo de metriko.

El „Sankta Marteno“

Nebul' al hirt'montetoj,
pluvete supreniras,
kaj sub la vent' kiu ŝiras,
ŝaŭmas kaj hurlas mar'.

Sed tra vilaĝo-stratoj
por ĝojo de l' animoj
akre odoraj vinoj
fermentas en kelar'

Trad. Battista Cadei

Inter la du mondmilitoj la plej elstaraj poetoj estas S. Quasimodo, E. Montale kaj G. Ungaretti:

La Patrino

Kaj kiam per pulsbato lasta l' koro
faligos muron, ho Patrin', el ombro
por alkonduki min ĝis la Sinjoro,
vi, kiel iam, donos al mi manon.

Vi surgenue, firma,
estos statuo antaŭ l' Eternulo,
kiel Li vin vidadis
dum vi ankoraŭ vivis.

Vi levos treme la maljunajn brakojn
kiel ĉe via morto
dirante: Jen, Di' mia.

Kaj nur se Li min estos pardoninta
vi sentos la deziron min rigardi.

Memoros vi la longon de l' atendo
kaj havos en l' okul' sopiron tujan.

Trad. Gaudenzio Pisoni

De tiu sama periodo la plej famaj roman-verkistoj estas I. Svevo kaj F. Tozzi. Ili daŭre influis kaj influas ankaŭ la nuntempan italan literaturon.

Post la dua mondmilito, kino-arto, poezio kaj prozo iom post iom ŝanĝiĝis kaj komenciĝis la „nov-realisma“ epoko, kies plej elstaraj poeziaj reprezentantoj estas: Franco Fortini kaj tute aparte Pier Paolo Pasolini; fakte, Pasolini aldonis al sia civila engaĝiĝo iom da eksperimentado, kiun oni povas vidi en ĉiuj iliaj verkoj, kiel ekzemple: *Transumanar e organizar* (1970). Ĉiuj nov-realismaj verkistoj celis interveni konscie pere de siaj verkoj al la socia evoluo por ĝiaj renoviĝo kaj progreso. Pro tio la verkistoj aktive partoprenis en la vivo de la politikaj partioj, precipe flanke de la maldekstraj partioj, kiuj al ili ŝajnas esti kvazaŭ liberigiloj post la faŝisma epoko. Tiamaniere la poetoj, verkistoj, ĵurnalistoj kaj eĉ reĝisoroj fariĝis voĉo de ĉiuj italoj kiuj esperas je nova kaj pli justa socio.

La plej elstaraj tiutempaj verkistoj estas sendube C. Levi kaj E. Vittorini. Ĉi tiu lasta verkisto en iu el siaj verkoj asertas ke la tradicia kulturo estas nur simple „konsola“ pri la homaj suferoj kaj ke, do, necesas revivigi la koncepton mem de „kulturo, kiun oni devus de nun konsideri kiel vokon al socia engaĝiĝo“. La instigo de Vittorini estis vaste aŭskultata. La plej konataj nov-realismaj verkistoj estas: V. Pratolini, I. Calvino kaj B. Fenoglio.

Ekde la sesdekaj jaroj de la dudeka jarcento la verkistoj sin dediĉis aparte al ekzistoproblemoj kaj al socia analizo pri la regiona vivo. Ni citu nur kelkajn el ĉi tiuj verkistoj: A. Moravia, I. Calvino, C. Cassola kaj L. Sciascia.

Nuntempe elinter la plej vendataj libroj en Italio estas am-romanoj kaj detektiv-romanoj, ekzemple la serio de la *Aventuroj de poliestro Montalbano* verkita de A. Camilleri, parte en la Sicilia dialekto. Al la sukceso de tiu ĉi verko kontribuis televida filmserio, kun milionoj da spektantoj.

Por la esperantistoj certe gravos scii, ke el la vastega itala literaturo (ĉi tie nur skize prezentita), oni realigis multegajn tradukojn en Esperanto. Jam en la unua lernolibro por italoj (jaro 1890) aperas kelkaj tekstoj de italaj aŭtoroj. Sed ili estis fragmentoj: la komenco de pli kompleta tradukado el la itala literaturo datiĝas en la periodo inter la du mondmilitoj kaj ĝi daŭras seninterrompe ĝis hodiaŭ. Post la tutunaj tradukoj de italaj beletraĵoj, faritaj de alilandaj esperantistoj (komence, fakte, la itala movado konsistis el „enmigrintaj“ esperantistoj), la italaj movadanoj preskaŭ konkuris por la disponigo en Esperanto de itallingvaj verkoj. Kune kun la iniciatoj de unuopaj esperantistoj gravas mencii la agadon de familio Minnaja: en 1934 *Literatura Mondo* projektis la redaktadon de *Itala Antologio*, kiu ne povis realiĝi pro la militaj eventoj. Post la dua mondmilito la projekto renaskiĝis ĉe Itala E-Federacio; kaj ĉirkaŭ familio Minnaja de Romo estiĝis traduka rondo de junaj romaj esperantistoj, kiuj tradukis multegajn tekstojn, sub la lingva aŭtoritata atento de Luigi kaj Carolina Minnaja. Ilia ĉefa merito estas, ke ili plenigis la tiamajn mankojn de tradukitaj verkoj (*Enciklopedio de Esperanto* en la tridekaj jaroj listigis manplenon da tradukitaj verkoj). Elstaris el tiu rondo Enrico Dondi kaj Luigi Minnaja (kiu sin dediĉis ankaŭ al traduko de famaj italaj kanzonoj).

Dum la jaroj, tamen, la tradukoj el la itala literaturo estis faritaj ankaŭ de neitalaj esperantistoj: multaj italaj poeziaĵoj kaj prozaĵoj estis esperantigitaj interalie de Waringhien kaj Kalocsay (al kiu ŝuldiĝas unu el la tradukoj de la *Infero* de Dante).

La planata projekto de la *Itala Antologio* finfine realiĝis. Tiu panoramo de la itala literaturo de la 13-a ĝis la 19-a jarcentoj estas hodiaŭ havebla pere de la Libroservo de UEA. Ĝia eldono, kompreneble, ne markis la finon de la esperantigoj: tiu intensa agado daŭras ankoraŭ hodiaŭ. Enrico Dondi realigis rimarkindajn tradukojn, inkluzive de nova eldono de *Purgatorio* kaj *Nova Vivo*, ambaŭ verkoj de Dante. Multajn tradukojn prilaboris Gaudenzio Pisoni, Renato Corsetti, Nicolino Rossi, Carlo Minnaja (*La Gastejestrino* de C. Goldoni), Giordano Azzi (redaktoro de *Itala Antologio*; tradukanto i.a. de Pascoli), Umberto Broccatelli kaj multaj aliaj.

Antaŭ kelkaj monatoj, en interreta dissendolisto pri la itala kulturo, furoris intensa tradukado de la poemoj verkita de Gioachino Belli en la roma dialekto.

Por la UK en Florenco estas tri novaj esperantigoj el la itala literaturo: *La Gefianĉoj* de Alessandro Manzoni, traduko de Battista Cadei, *La Princo* de Nicolò Machiavelli, traduko de Carlo Minnaja, kaj *La domo de l' mespilarbo* de Giovanni Verga, traduko de Giancarlo Rinaldo kun padovaj esperantistoj kaj reviziado de Carlo Minnaja kaj Filippo Franceschi.

Carlo Sarandrea kaj Silvia Garnerio

De Heronsgate al Roterdamo: Tiny Goldsmith kaj la domo de UEA

Enirante la Centran Oficejon de UEA, oni rimarkas sur la dekstra muro latunan honor-ŝildon kun la teksto: „Memore al Gesinjoroj J.E. Dinslage el Londono Anglujo pro donaco en 1936 de domo en Heronsgate Anglujo kies vendo havigis la bazajn rimedojn por tiu ĉi konstruaĵo”.

Kion la ŝildo ne indikas estas al kiu la domo estis donacita. UEA? Ne. IEL (kiu estis la kerno de la E-movado dum la milito)? Ankaŭ ne. Laŭ miaj informantoj (kaj laŭ dokumentoj elfositaj de Ziko Marcus Sikosek), montriĝas ke la domo estis persona donaco de ges-roj Dinslage al s-ro Cecil Goldsmith „por la uzo de la brita Esperanto-movado”.

Temas pri 1936, kaj inter la jaroj 1908 kaj 1947 la ĉefa oficejo de UEA troviĝis ĉiam en Svislando (ĉefe Genevo). Unuavide, ekzistis neniuj bezono de plia oficejo en Britio.

Mi ne povas paroli pri la Esperanto-domo en Heronsgate, sen ke mi enplektu la nomojn de kelkaj personoj. Jam menciitaj estas s-roj Dinslage kaj Goldsmith. Menciitaj estos ankaŭ la filino de Goldsmith, Eileen, kaj ŝia edzo Arthur Oliver (do, la bofilo de Goldsmith). Aliaj nomoj estos menciitaj, ekz. Generalo Bastien, prezidanto de UEA (poste IEL, Internacia Esperanto-Ligo) de 1934 ĝis 1947; kaj Robert Kreuz, iama direktoro de UEA. Sed la ĉefroluloj en la nuna kunteksto, pro sia forta ligo kun Heronsgate, estas ges-roj Dinslage, Goldsmith kaj Oliver.

Pri la unua paro mi trovis ke s-ro Dinslage estis dumviva membro de UEA kaj de IEL; li fakte mortis en 1943. Por scii pli multe, ni turnu nin al letero kiun mi ricevis de Arthur Oliver en novembro 1999, en kiu li diras: „Mi ofte renkontis ilin ĉe kongresoj: tre ŝatinda kaj iom kvieta paro ili estis. Mi kredas ke iliaflanke la Esperanto-movado egalas Tiny Goldsmith, ĉar ili proponis donaci la domon al Tiny por la konstanta uzo de la Movado.”

Eileen, filino de Goldsmith, estis 12-jara kiam ŝi helpis ĉe la libroservo de la Oksforda UK en 1930. Poste ŝi laboris kun sia patro en la oficejo de BEA, kaj ankaŭ pli malfrue kun li ĉe la CO en Heronsgate.

Arturo Oliver estis fakdelegito pri komercaj aferoj en Londono dum pluraj jaroj antaŭ la milito, kaj estrarano de IEL/UEA dum 18 jaroj inter 1936 kaj 1954. Post fruaj eksperimentoj por presi simplajn dokumentojn por la nova oficejo per primitivaj maŝinoj, li baldaŭ spertiĝis ĝis tiu grado ke li povis profitodone oferti bonkvalitan preslaboron al la publiko sub la nomo Esperanto Printers Ltd. Tiel li povis akiri pli modernan maŝinaron kaj aranĝi tiel, ke li povis provizi la CO per multaj administraj materialoj laŭ la originala kosto kaj absolute senprofite al EPL. Eileen kaj Arturo geedziĝis en 1943. Ges-roj Oliver estis kaj restas grava fonto de miaj informoj pri Heronsgate. Ili ankoraŭ vivas en Aŭstralio.

Mi volas halti iom pli longe ĉe s-ro Goldsmith (li preferus ke mi nomu lin “Tiny”, t.e. “Etulo”), kies foto aperis kiel frontispico en Jarlibro 2004 de UEA, kaj pri kiu Humphrey Tonkin en



ties antaŭparolo skribis: „Li estis eta homo plena de persista entuziasmo sed homo samtempe realisma [...] tiu eta homo, kiu dediĉis grandan parton de sia vivo al Esperanto kaj estis inter tiuj, kiuj tenis la E-movadon funkcikapla tra la skua militoperiodo.” Humphrey ne troigis!

Tiny naskiĝis en la okcidenta Anglio en 1889 kaj mortis 83-jara en Aŭstralio en 1972; li ŝajne kvalifikiĝis kiel kompania sekretario (administranto

de kompanio) laŭ la angla juro. Kio koncernas nin, estas ke li fariĝis esperantisto, 18-jara, en 1907. En siaj fruaj jaroj li jam multe aktivis por Esperanto en kaj ĉirkaŭ Birmingham (Anglio). En 1914 venis la unua mondmilito; fariĝinte oficiro en la brita armeo, li grave vundiĝis en Francio en 1916. Kuglo traŝiris la dekstran vangon (frakasante la apudajn dentojn), penetris kaj surdigis lian dekstran orelon, kaj ekripozis unu-du milimetrojn for de la membrano kiu protektas la cerbon.

Konsciaj pri la riskoj, la armeaj kirurgoj singarde forprenis la kuglon, sed la kuracistoj prognozis por li ege mallongan vivon. La brita militministerio, kun la „kvazaŭ-certa scio” ke oni devos pagadi al li dum tre mallonga tempo, asignis al li malavaran dumvivan pension, kaj en tiu maniero savis la E-movadon! Nia fripono vivos ankoraŭ 56 jarojn post tiu incidento, preskaŭ senĉese aktivante por la internacia lingvo. Kaj kiel profesia esperantisto li povis ĉiam akcepti nekredeble modestan salajron. Ekzemple, en 1939 kiam li ricevis 360 pundojn jare ĉe la CO, li rifuzis proponitan postenon je preskaŭ mil pundoj jare.

Kompreneble li tamen dum longa tempo suferis de la postefikoj de sia serioza vundiĝo. En tiu periodo li spertis la praktikan kaj moralan valoron de Esperanto, ĉar en 1923/24 li dum naŭ monatoj konvaleske loĝis ĉe samideanoj en Germanio.

En 1926, kiam la Brita Esperantista Asocio frontis krizon financan kaj administran, li ricevis la taskon gvidi ĝin el ĝiaj embarasoj. En tio li bone sukcesis. Enkondukinte kelkajn plibonigojn en la rutinajn laborojn de la oficejo, organizante karavanojn al UK-oj kaj interalie libroservojn ĉe kongresoj, li rimarkinde plibonigis la situacion.

Sed mono ankoraŭ malabundis. Estis grava manko de libroj (eĉ de lernolibroj); do li kun la helpo de kelkaj aliaj esperantistoj fondis EPC, The Esperanto Publishing Company, en kiu kompanio samideanoj povis praktike investi en eldonaĵoj en kaj por Esperanto. De malgranda komenco EPC bone kreskis; ĝi presigis dum la postaj 25 jaroj pli ol 300 000 volumojn (pli ol 100 diversajn librojn), inter kiuj estis lernolibroj, vortaroj, literaturo diversa, ŝekspirajoj, almenaŭ unu scienca verko, bele produktita



versio de *Fundamenta Krestomatio*, kaj multaj romanoj. Ĉu vi konas la Epokoserion? Ĝi sola konsistis el 11 libroj eldonitaj de 1932 ĝis 1946. La unua estis de Agatha Christie, *Murdo en la Orienta Ekspreso*, kaj se vi serĉos la nomon de la tradukinto vi trovos, ke respondecis por tio, jes, "Etulo". Fakte, ĝi estis la unua libro kiun mi legis en Esperanto.

EPC ekzistis 60 jarojn de 1928 ĝis 1988; dum Tiny vivis li estis la ĉefa dirigento de la entrepreno, kaj poste tion transprenis ges-roj Oliver. Sed EPC, kvankam grava entrepreno por Tiny, estis flanko afero! Gvidante EPC li samtempe aktivadis en diversaj roloj en la E-movado ĉe niveloj loka, federacia, nacia kaj internacia, ofte helpate de sia filino Eileen. Poste en la vivo Tiny organizis la Universalajn Kongresojn en Oksfordo, Londono kaj Bournemouth kiel sekretario de la kongresoj. Kaj krome li jam dum jaroj reprezentis BEA ĉe la UK-oj; mi ne



Tiny Goldsmith

dubas, ke kiam oni diskutis la financajn problemojn en Ĝenevo li atentigis, ke administraj kostoj en Britio estus multe malpli altaj ol en Svislando. Tio kondukas min al temoj rilataj al la historio de la Esperanto-movado.

Jam de antaŭ la unua mondmilito oni diskutadis kaj disputadis en kaj ekster la UK-oj pri la formo kiun adoptu la E-movado. Ne eblas ĉi-loke eniri detalojn, sed la historio de UEA estas tre interesa, eĉ fascina. Temas, kompreneble, grandmezuro pri: personecoj kaj... financo. Kiam Hector Hodler mortis en 1920, li heredigis konsiderindan monsumon por garantii la daŭran ekziston de UEA. En Ĝenevo la granda, impona, oficeja direktoro Robert Kreuz regule prezentis ĝis 1936 buĝetojn kun seriozaj deficitaj. La kapitalo Hodler minacis malaperi rezulte de la ĉiujaraj atakoj kontraŭ ĝi. En la 1-a de februaro 1936 subite mortis tiu direktoro Robert Kreuz. Granda krizo. La Estraro devis urĝege trovi anstataŭanton. Sed kiun? La prezidanto de UEA, Generalo Bastien, petis Tiny Goldsmith veturi al Ĝenevo por transpreni la gvidadon de la oficejo. Tion li faris, kaj baldaŭ poste la Estraro nomis lin direktoro kaj samtempe komencis serioze konsideri translokadon de la CO al Anglio. Ne surprizas min legi, ke Tiny kiel nova direktoro de UEA tuj prezentis projekton de ekvilibra, sendeficitita buĝeto danke al ŝparoj prognozeblaj sekve de tia translokiĝo al Britio.

Aliflanke ni ne miru ke la ĝenevanoj, opinante ke la neŭtrala lando Svislando estas la natura centro por la E-movado, forte protestis pri la planita revolucio kaj eĉ atentigis svisan tribunalon pri la kontraŭleĝa rompo de kondiĉo en la Statuto, kiu difinis ke la CO de UEA troviĝas en Ĝenevo. Pro tio evidentiĝis al Bastien kaj Goldsmith, ke por efektiviĝi siajn planojn estos necese krei tute alian organizon kun alia nomo.

En 1936, dum la Estraro kaj Komitato konkretigis siajn planojn, ges-roj Dinslage unu tagon anoncis al Tiny sian pretecon donaci domon al li, sub iuj kondiĉoj, kaj en la 12-a de septembro kunvenis la Konsilantaro de BEA por konsideri la oferton.

La rezulton de tiu kunveno oni tre klare ekscias el letero kiun skribis Tiny Goldsmith al prezidanto Bastien la 14-an de septembro:

Pro la sinteno de iuj svisaj membroj de UEA, la BEA-konsilantaro unuanime decidis ke BEA eksiĝas el UEA kaj aliĝas

al Internacia Esp.-Ligo. Pri la promesita domo en Heronsgate la kondiĉoj estas: ni konsentas uzi ĝin kiel nian sidejon. Per la domo ni havigos hipotekon por akiri monprunton kaj donacos (en la nomoj de la donacintoj) 250 pundojn al la doma kaso de BEA, tiel ke ambaŭ asocioj partoprenos la donacon. Grave: Se iam IEL likvidiĝos aŭ translokiĝos ekster Anglujon, la domo devas esti transdonita al BEA.

La domo valoras minimume 1500 pundojn. [Hodiaŭ 3mln' =jr] Ĝi troviĝas proksimume 28 km de la centro de Londono. Ĝis kiam nia asocio estos laŭleĝe registrita, ni ne rajtas akcepti ĝin, sed mi aranĝis ke oni faru la transdonon al mi, kaj samtempe mi pretigos garantion de kuratoreco favore al IEL, tiel ke – kiam post kelkaj monatoj ni laŭleĝe registros nian asocion ĝi aŭtomate proprietas la domon.

Ĉe tiu punkto Tiny detalas sufiĉe precize la necesajn kostojn de la tuta afero – per hipoteko akiri ĝis 750 pundojn; elspezi 250 + 150 + 200 ktp, do restos minimume 100 pundoj kiel kapitalo utiligebla, se necese, dum la unuaj du-tri monatoj.

Tiny finas sian leteron per: "La donacintoj estas ges-roj J.F. Dinslage, en Londono. Ili petis ne citi la nomon."

La komitato de IEL aprobis tiun aranĝon. Oni akiris la deziritan hipotekon kaj la necesan monprunton en la nomoj de Goldsmith kaj Oliver kiel kuratoroj de la domo por IEL. Laŭleĝe la domo apartenis al ili. Dum la negocoj ili trovis ke iu ajn mencio de eventualaj rajtoj de BEA nuligus la eblecon de la necesa prunto; sekve, la nomo de BEA aperis en neniua oficiala jura dokumento.

Pri la domo mem

La donacita domo estis tro ortangula (laŭ mi) por esti taksata bela; sed ĝi tamen estis eleganta vilao, kun teraso kaj sur terpeco de unu hektaro – multaj arboj, 40 pomaj plus 10 alifruktaj; tre bela ĝardeno kun laŭbo el rozoj diversaj; kreskis tie pluraj legomoj, framboj, grosoj.

La teretaĝo de la ĉefa parto de la domo prezentis du ĉambrojn taŭgajn kiel oficejoj. Unu fariĝis la administrejo kaj la alia libroservo. Sur pli alta etaĝo prezentigis komforta loĝebleco por la ĝenerala sekretario. Ligita al la domo staris duetaĝa alo kun sia propra ĉefpordo. Ĝi fariĝis en la CO rezervejo por paperostokoj, por librostokoj kaj... por konservi pomojn. Por prizorgi tian ĝardenon oni bezonis ĝardenistojn, kiuj laboris unu tagon semajne. Ĉiu-aŭtune oni amase rikoltis – kaj vendis – pomojn. Kaj la profito el la vendoj (plua lerta truko de Tiny) grandmezure kovris la tutjaran koston de la ĝardenistoj.

Pri la domo mem mi ne bezonas plu diri. Ĝi taŭgis kiel administrejo.

Tiny evidente estis preta sin oferi por eviti pluajn deficitajn. Se mi citas el la antaŭparolo skribita de prezidanto Bastien por Jarlibro 1939: „Mi dankas ĉi tie s-ron Goldsmith, kiu mem proponis labori sola kun nur unu helpantino, ĝis la kresko de nia Ligo devigos nin denove dungi aliajn helpantojn.” Bastien tion skribis en 1939, kiam Germanio, ankaŭ Aŭstrio, jam estis malaperintaj de nia scenejo; baldaŭ simila sorto atendis Ĉeĥoslovakion, Pollandon – kaj aliaj eŭropaj landoj estos

Radio 3ZZZ Melburno

En la aŭstralia havenurbo Melburno ekzistas loka multlingva radio ZZZ, kiu ĉiusemajne elsendas unu horon en Esperanto. Pri ĝiaj historio kaj nuntempo skribis unu el ĝiaj teamanoj, Jennifer Bishop.

La unua Esperanto-programo aŭdeblis la 26-an de oktobro 1989. Danke al la juristo Kep Enderby (Prezidinto de UEA) nia lingvo estis akceptita inter 70 etnaj lingvoj por la loka multkultura komunuma radiostacio 3ZZZ, Melburno, kun elsendradiuso 100km.

La iniciatinto Svetislav Kanački bone memoras la unuan radiostudion, kvazaŭ en ŝranko sub la ŝtuparo de la impona Trades Hall, sidejo de laboristaj sindikatoj. Ekde la komenco kaj dum dek jaroj la nacia registaro subvenciis la radiostacion 3ZZZ. La registaro ĝin ankoraŭ helpas, sed malpli kaj ĉiam post interkomprenado ke estas la devo de la radiostacio serĉi pagantajn membrojn kaj starigi 'Radiotono' – monkolekton inkluzive de tombolo. Tion ĝi faras ĉiujare kun la helpo de elektita estraro, kiu kreis tabelon kun monkvantoj pagendaj de ĉiu lingvogrupo depende de la nombro da membroj kaj la dezirata longeco de la programo.

Iom post iom la Esperanto-komunumo kreskis por krei unuhoran programon lunde 13h00-14h00, ĉiusemajne, t.e. 52 fojojn jare. Dum ĉi tiu periodo la radiostacio sukcesis gajni sufiĉe da mono, por fine ebligi la aĉeton de granda spaco kaj instaligi kvar bone ekipitajn studiojn; du por elsendi, unu por prepari programojn kaj unu pligrandan por registri intervjuojn, muzikgrupojn ktp. Preskaŭ ĉiuj estis kontentaj, sed la Esperanto-grupo bedaŭris ke ĝiaj programoj aŭdeblis nur 100 km ĉirkaŭ Melburno, kvankam ĝi gajnis financan subtenadon kaj de AEA kaj de multaj individuoj tra la tuta Aŭstralio. Se petita, Svetislav Kanački eĉ sendis programojn sur kasedo al tiuj kiuj deziris aŭskulti, sed loĝis for de Melburno.

Mi konfesas ke, kiel membro de la teamo, mi komencis seniluziigi pro la manko de aktivaj aŭskultantoj kaj ties komentoj pri la programo. Tamen ĝuste tiam la teknikistoj komencis prilabori la novan teknologion de la interreto.

Nun eblas aŭskulti la Esperanto-programon, inkluzive informojn, intervjuojn, la lingvokurson *Jen Nia*



Mondo, legaĵojn el gazetoj kaj muzikon el multaj KD-oj aĉetitaj el mondonacoj.

Kaj – ĝi nun aŭdeblas interrete dum la tuta semajno ĉe www.3ZZZ.com.au kaj danke al Redd Scott ĉe www.radioarkivo.org.

La teamo dankas al eksterlandaj aŭskultantoj, kiuj sendas siajn komentojn kaj petojn al la retadreso de Svetislav Kanački: evskank@hotmail.com.

Antaŭdankon al novaj aŭskultantoj, ankaŭ pro la komentoj kaj reagoj.

Pola Radio elsendas Esperante por la monda elito

Tian aserton faris la prezidanto de la akcia kompanio Pola Radio Andrzej Siezieniewski dum la solenaĵo okaze de la 70-jariĝo de ĝia internacia fako Radio Polonia.

La solenaĵo okazis vendrede la 28-an de februaro 2006 en la palaceto de la pola ministerio pri eksterlandaj aferoj. La prezidanto Andrzej Siezieniewski en sia malferma solena parolado aparte menciis la laboron de la redaktoroj de la esperantlingvaj programoj de Radio Polonia. Li parolis pri la graveco de la eksterlandaj elsendoj kaj klarigis, kial gravas ankaŭ la elsendoj en Esperanto:

„Ni elsendas en la internacia lingvo, ĉar estas evidente, ke ni volas per niaj programoj, diskonigantaj Pollandon, diskonigantaj la polan ŝtat-intereson kiel filozofion de nia funkciado en la mondo – atingi ĉiujn naciojn de la mondo. Ni estas unu el la malmultaj radio-stacioj, kiuj elsendas en Esperanto. Malgraŭ la malgranda konsisto de tiu ĉi redakcio kaj ĝia mallongdaŭra programo, nur duonhora – la rezulto de ĝia dissendo estas tre grava, ĉar ni atingas tiamaniere la mondajn elitojn. Ĉar kiu parolas Esperanton? Homoj ĉiuflanke edukitaj, homoj okupantaj tre altajn postenojn en siaj landoj.”

La solenaĵon ĉeestis polaj ministroj, estroj de la diverslingvaj redakcioj, ĵurnalistoj kaj eminentuloj de polaj ŝtataj kaj neŝtataj instancoj. Ĝi finiĝis per torto, ŝaŭmvino kaj intervjuoj al la redakcioj de la eksterlanda servo de Pola Radio.



Andrzej Siezieniewski

Imitinda ekzemplo por kameraistoj

Muroj de miljaroj / Je en Ĉinio. Roman Dobrzyński.

Varsovio: la aŭtoro, 2004. 32 + 25 min. DVD. Prezo: € 21,00

Ĉu vi ĉeestis la 89-an UK en Pekino? Se jes, havigu al vi la DVDon *Muroj de Miljaroj* faritan de Roman Dobrzyński, ĉar ĝi refreŝigos vian memoron pri scenoj kiujn vi travivis, kaj montros al vi ankaŭ scenojn neviditajn de vi en la menciita plej grava evento de esperantistoj en la jaro 2004.

La bildserio komenciĝas per viva sceno de mirinda akrobata ludo per teleroj turniĝantaj sur vergetoj dum dancado kaj transkapiĝo kaj prezentas la plej gravajn erojn de la evento. Vi vidos la gajan viglon de la internacia balo, ĉinajn folklorajn dancojn kaj ĉinan operon pri morta lukto per glavoj, ekzercon de ĉina tradicia gimnastiko tajĝiĉjüano kaj Esperantajn aktivajojn de infanoj. Kaj krome vi aŭdos ankaŭ parolojn de komercistoj, turistoj, instruistoj, artistoj kaj denaskaj esperantistoj pri sia sperto en praktika uzo de Esperanto; kaj vidos ĉin-stilajn konstruaĵojn inkluzive de la Ĉiela Altaro (la simbola konstruo de Pekino) en somera pluvo kaj modernajn nubskrapulojn en komerca kvartalo.

Kredeble ĉio ĉi valoros por vi pro reĝuo de la plezuro, kiun la 89-a UK havigis al vi. Kompreneble ĝi utilis des pli al la esperantistoj, kiuj ŝatus sed ial ne povis persone ĉeesti la kongreson.



Aldone al tiu parto pri la 89-a UK la disko kun la daŭro de unu horo enhavas ankaŭ bildraporton *Je en Ĉinio* pri la vizito de Roman Dobrzyński al Hefei, la ĉefurbo de Anhui-provinco. Per serio da scenoj vi vidos la vivon de tiu moderniganta urbo kun historio de pli ol 2000 jaroj. Kvankam en la raporto ne multe aktivis lokaj esperantistoj, tamen certe vin impresos la Esperanta aktivajo de Liu Jianguo, kiu ebligis al

Roman Dobrzyński la viziton al tiu urbo en la orienta Ĉinio. La disko praktike montras al ni la utilon de Esperanto en turismo kaj kulturaj aktivadoj. Kredeble, tiu sukcesa raporto kuraĝigos aliajn eŭropajn esperantistojn viziti Ĉinion per la helpo de Esperanto, kuraĝigos la ĉinajn esperantistojn kaj akcelos la disvolviĝon de la ĉina E-movado, kiu ludas pli kaj pli gravan rolon en la internacia Esperanto-movado.

Post rigardo de tiuj du novaj filmoj mi sentas la emon danki nian profesian kameraiston Roman Dobrzyński pro lia nelacigebla klopodado vigligi la E-movadon per sia akra vido por kapti bonajn ŝancojn per sia kamerao kaj lia lerteco en sia fako. Imitinda estas lia ekzemplo por ĉiuj profesiaj kaj amatoraj kameraistoj, kiuj deziras ion fari por la prospero de nia movado.

Laŭlum

Malkohere kaj malintime

Intimaj temoj en la Esperanto-beletro. Red. Petr Chrdle. 103p. 20cm. Dobřichovice:

KAVA-PECH, 2005. ISBN 80858553744. Prezo: € 8,70

Post OSIEK-konferenco en 2004 kun la titolo *Intimaj temoj en la Esperanto-beletro*, Petr Chrdle, la organizinto, eldonis kolekton da kontribuaj libroforme. Tio povus esti bona ideo, se la kontribuajoj efektive traktus tiun temon. Sed plejparte ili ne faras tion.

Aperas naŭ kontribuoj de ok aŭtoroj. El ili nur unu plene kongruas kun la titolo. Pluraj temas nek pri Esperanto-beletro, nek pri io ajn nomebla intima temo.

Vlastimil Kočvara interese prezentas la ĉeĥan poeton Mácha. Jean-Luc Tortel eseante pri mem-biografiaĵoj faras strangan provon kribri beletron disde alio per la lingvaĵo. Eugène de Zilah egocentre intervjuas sin mem pri sia propra verko, kaj poste nebulumas pri diversaj teroroj. Blanka teroro por li ekzemple estas monpuno pro ebria stirado.

Gerrit Berveling traktas seksajn agojn en la *Biblio* kaj rolojn de virinoj en la frua kristanismo. Miroslav Malovec prezentas interesan biografion pri Eli Urbanová, kaj tiu poetino mem



mallonge asertas, ke pri ĉio en ŝia vivo kulpis viroj.

Christian Declerck en sia dua prelego iomete traktas intimajn temojn en Esperantaj biografiaĵoj, sed ĉefe analizas, kio estas biografiaĵo, temo, fabulo, diversaj rakontmanieroj, interpretadoj kaj signifoj.

Maria Butan dediĉas kvar paĝojn al difinoj de la nocio atendo, poste kvin al tiu nocio en la Esperanta literaturo, pli precize en la proza antologio *Trezoro* el 1989. Kelkaj el ŝiaj ekzemploj ja rilatas al iaj "intimaj temoj".

Restas nur unu ero, la unua prelego de Declerck, kiu vere difinas kaj diskutas la terminojn intima kaj

fikcio, kaj poste prezentas ekzemplokatalogon de intimaj temoj en deko da Esperantaj verkoj, tamen sen citaĵoj kaj sen vera analizo.

La verko redaktita de Chrdle do estas malkohera kaj ĝia enhavo plejparte ne respondas al la titolo, kvankam oni ja trovas en ĝi kelkajn interesajn tekstojn pri diversaj aferoj. Plej stranga sendube estas la kontribuo de de Zilah, sed ankaŭ tiu de Tortel ŝajnas al mi iomete bizara.

Sten Johansson

Tradicia ĉina saĝeco en klorofilhava dika dietlibro

Tradicia ĉina dieto. Wang Disheng. Hong Kong: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 2004. 359p. 21cm. ISBN 9889726722. Prezo: € 7,50

La homo estas la specio, kiu havas la plej vastan gamon da manĝaĵoj kaj kiu ĉiam serĉas pliajn, novajn. La homo ankaŭ demandas sin kion manĝi kaj ofte interŝanĝas informojn pri la dieto kun anoj de diversaj ekosistemoj. La prahomo loĝanta en diversaj ekohejmoj dividis manĝaĵojn per la metodo 'provo kaj eraro', nur en du kategoriojn: manĝaĵoj kaj nemanĝaĵoj. En la naturo kreskas miloj da amaraj vegetaĵoj, sed la homo elektis konsumi nur kelkajn, ekz. kafon kaj amaran kukurbon. Ne ĉiujn dolĉaĵojn oni manĝas. Dum jarmiloj la homo lernis kion manĝi kaj kion ne. La korpnaturo kunkreskis kun la naturo.

Poste, kuirmanieroj (boligi en akvo, friti en oleo, baki ktp) estis inventitaj por fortigi la guston, faciligi la digestadon kaj senvenenigi la manĝon. Tiel evoluis la medicino. Sed ĉie en la mondo la homo kurioze konjektis la rilaton inter la gusto kaj ties efiko je la korpo. Kelkaj manĝaĵoj montris nekompreneblan efikon je la korpo kaj tian naturon la tradicia ĉina saĝeco nomas 'al-ĝin-kanaliĝo'. Oni diras ke la ĉina kuirarto estas tro komplika sed la gusto estas tre bona. Ne nur bona sed ankaŭ saniga kaj kuraca.

La ĉina esperantisto kaj kuracisto Wang Disheng, post multjara sperto en la fako, kompilis enciklopediecan libron pri la tradicia ĉina dieto. La aŭtoro eklaboris je la libro post prelegoj pri la temo en Norvegio. Danke al la invito, apogo kaj kuraĝigo de la tieaj esperantistoj la aŭtoro librigis la kvintesencon de la tradicia ĉina dieto (TĈD) kaj la tradicia ĉina medicino (TĈM), kiuj ne estas disigeblaj, ĉar ofte la manĝo estas uzata kiel medikamento en la tradiciaj medicinoj.

La libro priskribas la bazajn teoriojn de la ĉinaj medicino kaj dieto kaj asertas ke tiuj teorioj komprenigas la enan naturon de la



dieteroj. Ne temas pri la vitaminoj aŭ nutraĵoj de la dieto sed pri la kvalitoj de la dieteroj, ekz. propreco, gusto, ag-direkto kaj al-ĝin-kanaliĝo.

La gusto estas tre influhava punkto en la elekto de manĝaĵo. La ĉina tradicia dieto rekonas 5 gustojn (dolĉan, acidan, salan, pikan kaj maldolĉan aŭ amaran) kaj atribuas la efikojn. Al-ĝin-kanaliĝo estas specifa efiko de manĝaĵo al iu organo aŭ parto de la korpo. La libro listigas, en multaj tabeloj, la rilatojn inter la gustoj, sezonoj, sentorganoj, internaj organoj, elementoj, proprecoj, al-ĝin-kanaliĝo ktp. Poste venas la diversaj receptoj preparitaj el multaj vegetaĵoj kaj nevegetaĵoj.

Ne surpriziĝu trovi ankaŭ manĝaĵon faritan el la tuta korpo de skorpio. Ĉiu legomo aŭ nelegomo kuiriĝas por diversaj pladoj. Sekvas la listo de malsanoj aŭ sindromoj kaj taŭgaj manĝoreceptoj, ekz. kancero, diabeto, astmo ktp. Parolante pri kancero la aŭtoro asertas ke ĉiuj ĉi manĝaĵoj helpas pli ĝuste preventi kaj asisti en la kuracado de tiuj malsanoj. La manĝaĵojn oni povas facile prepari hejme. Porkcerbon por forgesemo, cervopenison ĉe impotenteco, sovaĝan rozon ĉe kancero ktp. La aŭtoro provas kompreni nin pri la teorioj de TĈD kaj TĈM per simplaj vortoj kaj analogioj. La ĵin-ĵang-principo estas la centra koncepto en la TĈD kaj TĈM. La ses ĉapitroj de la libro traktas pri la bazaj principoj de la tradicia ĉina kompreno de la naturo kaj la manĝuracado de oftaj malsanoj. La aŭtoro tre sisteme traktas la temon kaj eltiras la utilajn informojn el historiaj verkoj kaj sia longa sperto en prezento facile konsumebla por la fremda leganto. Ĉiu preskribo baziĝas sur aŭtentikaj mencioj en la tradicia saĝeco de Ĉinio. Certe la libro satigos vian apetiton. La manĝaj kulturo de la mondo riĉiĝas per ĉi tiaj verkoj.

P.V. Ranganayakulu

Steele kronikas plu

La fotoalbumo (dua volumo). Trevor Steele. Vieno: IEM, 2005. 165p. 23cm. Prezo: € 15,00

Per *La fotoalbumo* Trevor Steele volas prezenti tri generaciojn en la vivo de aŭstralia familio.

La unua volumo el 2001, pri la jaroj 1939-65, prezentis la unuan generacion kaj la junaĝon de la dua. En la dua volumo aperas la jaroj 1966-69, ĉefe el la vidpunkto de la dua generacio. Temas pri kelkaj gefratoj, iliaj geedzoj, amikoj kaj kolegoj. La verko parte sekvas kolektivon, kvankam la vera ĉefrolulo ŝajnas esti David. Li kaj lia frato Sean estas detale, plurdimensie kaj konvinke prezentataj. Aliaj rolantoj ofte aperas pli ŝablone, kio povas esti natura pro la nombro de rolantoj, sed iom ĝenas en la ĉapitroj kie ili rolas pli grave. Precipe tio validas pri Helga kaj Bridget, la edzinoj de Sean kaj David.

Same kiel en la unua volumo la aŭtoro enkondukas ĉiun ĉapitron per priskribo de foto en familia albumo.

La plej valora trajto de ĉi dua volumo laŭ mi estas kelkaj interesaj scenoj el la vivo de David. Temas pri liaj zorgoj pri amo kaj politiko. Rolas liaj rilatoj al la edzino, al la kamaradino/amatino Genny kaj al la aŭstralia militado en Vjetnamio. En la scenoj ofte aperas tre viglaj dialogoj, kelkfoje en la konata suka lingvaĵo de Steele.



La familio de la romano estas Irlando-devenaj katolikoj. En la unua volumo moralaj dilemoj kaj religia edukado ludis sufiĉe gravan rolon. En ĉi dua volumo la moralaj dilemoj aperas ĉefe en politika formo rilate al la milito en Vjetnamio. Religiaj kaj ekleziaj malkonsentoj ja disigas la familianojn, tamen la katolikismo de kelkaj el ili ŝajnas al mi iom karikatura.

La aŭtoro tamen ne ĉiam kreas scenojn. Tro ofte laŭ mia gusto aperas klarigoj kaj rakontoj, kie la aŭtoro voĉo estas iom seka, senpersona. Iufoje aperas eĉ informa parto preskaŭ ĵurnalisma. Ekz. sur la paĝoj 114-116 Steele kvazaŭ gazetartikole priskribas

la aŭstralian traktadon de militrifuzantoj en la sesdekaj jaroj. Nu, kompanse ni poste ricevas tre sukcesan kaj atentokaptan scenon kun David en kontraŭmilita manifestacio (p. 119-122). Persone mi preferus, se li enfokusigus pli multe tiujn bone tajlitajn partojn kaj eble fortranĉus iom el la vivo de flankaj parencoj pli ŝablone prezentataj.

Kvankam la dialogoj ĉiam estas viglaj, tamen mi ne ĉiam trovas ilin tre naturaj. Unu ekzemplo estas longa dialogo inter la fratino

Zoe kaj ŝia bofratino Bridget (p. 131-133). Parte tio povas ŝuldiĝi al la karikatura karaktero de Bridget.

La lingvaĵo de Steele estas alia bona trajto de *La fotoalbumo 2*. Ĝi fluas glate kaj portas la rakonton sen stumblaĵoj. Nenie oni indikas ĉu sekvas plia(j) volumo(j), sed laŭ la karaktero de

la fino ŝajnas evidente ke jes. La tria generacio ĵus komencis naskiĝi. La eldonejo IEM sub editorado de Herbert Mayer ĉiam prezentas teknike belajn verkojn. Ĉi-okaze oni tamen ial elektis mikroskopian kaj malgrasegan litertipon.

Sten Johansson

Unika kaj subteninda projekto pri esperantologio

Esperantologio / Esperanto Studies, n-ro 3. Red. Chrisler Kiselman. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2005. 68p. 21cm. ISSN 13113496. Prezo: € 7,50



Tre bedaŭrinde, sed fakte, pri esperantologio kaj interlingvistiko okupiĝas relative malmultaj sciencistoj, kvankam ĉi tiu fako meritis multe pli da atento kaj apliko. La plej freŝa kajereto de la revuo *Esperantologio / Esperanto Studies / EES*, kiu estis fajne preparita de Christer Kiselman de la Upsala universitato (Svedio) kaj presita de la eldonejo KAVA-PECH (Ĉeĥio), iusence iom respegulas la

nefacilan staton de ĉi tiu fako. Unue la revuo aperas tro malofte kaj tro malregule, due kontribuajtoj tro malabundas, trie vere novaj kaj signifaj esperantologiaj studoj evidente estas malfacile akireblaj, ĉar tro malmulte produktataj. La ĉi prezentita kajero estas, kun 68 paĝoj, do entute nur la tria post du antaŭaj numeroj en la jaroj 1999 kaj 2001! Tamen. Tio, kion oni tenas en la manoj, estas laŭ amplekso ja modesta, sed enhave des pli juvela, surpriza.

La laboro plenumita malantaŭ tiuj artikoloj estas konsiderinda. Precipe elstaras en ĉi tiu numero la psikolingvista esploro de Hiroshi Nagata kaj Renato Corsetti, kiu traktas la temon „Influo de gepatra lingvo sur la lernadon de Esperanto“ pere de du taskoj: juĝado de akceptebleco de frazoj kaj libera priskribado de bildo. En tiu laboro, kies dumaj rezultoj estas publikigitaj, partoprenis entute 111 parolantoj angla-, pers-, hungar- kaj ruslingvaj, malsamaj rilate la sperton en la scipovo de Esperanto (komencantoj, progresantoj kaj spertuloj). Ĉi tiu empiria esploro, kiu, konfese, estas eble eĉ por fakuloj ne tre facile digestebla, estis subtenita de la FAME-Fondaĵo kaj finita en 2002. Studoj de tiu speco ekzistas tre malmultaj. Samtempe la aŭtoroj montras sin konvinkitaj „ke Esperanto povus fariĝi unu el la plej bonaj testlingvoj por esplori diversspecajn problemojn en lingvistiko kaj psikolingvistiko, aparte pro ties fleksebleco pri sintaksa strukturo kaj vortfarado“.

Aliaj kontribuajtoj priskribas la esperantologian agadon de Gesellschaft für Interlinguistik/GIL (Renato Corsetti), analizas nove trovitajn dokumentojn de la „Mondlingva Klubo“ de Nurenbergo el la urba arkivo, ilustrante la ŝanĝiĝantan identecon de tiu frua planlingva organizo, kiu servis kiel ĝermego por la posta berlina Esperanto-grupo (Marcus Sikosek). Same el la historio de esperantologio estas rememorigate pri la unua esperantologia periodaĵo *Lingva Kritiko* kiu en 1932-1935 aperis kiel aldono al *Heroldo de*

Esperanto ĉefe dank' al la klopodoj de Teo Jung en Kolonjo. En la komentita kronologia indekso estas menciitaj la tiamaj diskutoj esperantologiaj (Bernhard Papst). Krom la artikolo de Sikosek, ĉiuj aliaj kontribuajtoj estas verkitaj en Esperanto.

Ĉi unika projekto estas „ia“ daŭrigo de la iama revuo *Esperantologio*, kiun redaktis Paul Neergaard dum la jaroj 1949–1961. Eĉ se pro la supre menciitaj kialoj oni emus dubi pri la senco kaj esenco de la relanĉita revuo-projekto, estas absolute klare, ke necesas subteni ĝin kaj klopodi, por ke povu aperi regule pli da eldonoj kun signifaj novaj sciencaj kontribuajtoj. Finfine, la sukceso de la Esperanto-movado dependas ankaŭ de la kondiĉo, ke esperantologoj kaj interlingvistoj kapablas efektiviĝi profesion verkanon, interesi la publikon pri sia fako kaj vastigi la rondon de fakuloj.

Cetere, la revuo kaj ĝia enhavo estas atingeblaj ankaŭ rete sub la adreso <http://www.math.uu.se/esperanto>. La unua kaj dua kajeroj estas ankoraŭ haveblaj ĉe UEA kaj ĉe kiselman@math.uu.se.

Andreas Künzli

La angulo de



Esperantlingva Verkista Asocio
<http://www.everk.org/>

Edmond Privat: El: «Ĉu en tombejo?»



Dum tie vi staris en nigra mantelo
kaj ĉerkon en foston aŭskultis degliti,
ĉu brilis la suno? Ĉu bluis ĉielo?
La tombon neniam mi volis viziti.

Sur tombo violojn vi ŝutis kun ploroj,
kaj iu kun rozoj vin iris imiti.
Mi dankas, amikoj, pro larmoj kaj floroj;
la tombon mi tamen ne volas viziti.

Eksidas la vintro, dum falas arĝento,
sur krucoj granitaj por longe mediti;
kaj kantas la neĝo pri l' dolĉa silento,
eĉ nun mi la tombon ne volas viziti.

Edmond Privat (1889-1962), el Svislando, estis eminenta esperantisto dum la unua duono de la pasinta jarcento. Li estis prezidanto de UEA, kaj multfacete kontribuis al la movado. Lia literatura agado certe ne estas lia plej konata flanko, kaj tamen ĝi certe meritas rekonsideron.

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

Almanako Lorenz 2005.

Rio de Janeiro: SES Lorenzo, 2005. 96p. 21cm. ISBN 8586984205. Artikoloj, eseoj, poemoj religiaj, filozofiaj, movadaj. € 2,40

Dictionnaire de poche

/ Poŝvortaro. Français-Esperanto / Esperanto-Français. Red. André

Andrieu. Paris: SAT-Amikaro, 2005. 27+94p. 15cm. ISBN 2950880975. Dudirekta; taŭga por komencantoj. € 5,40

Extraordinaire diversité des langues et sa répercussion sur l'espéranto, L. André

Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2006. 103p. 21cm. ISBN 2906134708. Francilingva. Informoj, faktoj kaj kuriozaĵoj pri centoj da lingvoj. € 9,00

Fundamento de Esperanto.

Eldono Nederlanda.

L.L. Zamenhof. En la nederlandan trad. P. Desmet. Antverpeno: FEL, 2005. 136p. 21cm. ISBN 9077066195. Nova traduko! € 10,20

Gefianĉoj, La. Alessandro

Manzoni. El la itala trad. B. Cadei. Macerata /Milano: Edizioni Simple / FEI, 2006. 495p. 20cm. ISBN 8889177233. Serio Oriento-Okcidento n-ro 41. Historia romano – ekskurso en la kulturan kaj socipolitikan situacion en la Milana teritorio en la frua 17-a jc. € 30,00

Kratko râkovodstvo s gramatika i priloenija.

Jordan Ĉaljevski, Todor Kurtev. Sofia: BEA, 2003. 128p. 16cm. ISSN 02049651. "Konciza gvidlibro kun gramatiko kaj aldonoj por

aŭtodidakta aŭ kolektiva konatiĝo kun la plej perspektiva internacia lingvo Esperanto". € 2,10

Langue internationale.

Préface et manuel complet.

Dr. Esperanto. Antwerpen: FEL, 2006. 48+2p. 21cm. Represo de la unua libro por francoj. € 5,10

Pasporta Servo. La listo de gastigantoj de TEJO, 2006.

Rotterdam: TEJO, 2005. 186p. 16cm. ISBN 8392338200. Mapoj. Kun 1320 adresoj en 92 landoj. € 15,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Piccolo manuale di

esperanto con dizionario.

Amerigo Iannacone. Venafo: Eva, 2006. 147p. 21cm. ISBN 8888030824. Itallingva kurso en 25 lecionoj, kun listo de falsaj amikoj, eta antologio de tekstoj kaj dudirekta vortareto. € 16,50

Plena manlibro de Esperanta gramatiko.

Bertilo Wennergren. El Cerrito: ELNA, 2005. 696p. 24cm. ISBN 0939785072. Bind. Ĉu rivalo de la ĉiam populara "Plena Analiza Gramatiko"? Plena Manlibro estas unuavice praktika lernilo, ne teoria verko por lingvistoj. € 27,00

Sudokoj – Naŭopumoj. 80 amuzaj cifero-enigmoj je 4 diversaj niveloj.


Lode Van de Velde. Antwerpen: FEL. 128p. 15cm. € 3,00

Verse rakonte novele.

Eugeniusz Matkowski. Toruń: Flamo, 2004. 60p. 21cm. ISBN 8391901246. Kvazaŭ aŭtora antologieto. € 4,80

Zamenhofova ulica. Roman

Dobrzyński. En la slovakn trad. S. Marček. Martin: La tradukinto, 2006. 279p. 21cm. ISBN 8096944681. Ilus. Bind. Slovakingva versio de *La Zamenhof-strato*. € 18,00



Katalogo de artikoloj

En la retejo UEA.ORG ekde la komenco de marto 2006 estas alirebla katalogo de artikoloj el E-periodaĵoj. Momente en ĝi estas 3895 enskriboj pri artikoloj en 74 E-aj periodaĵoj por pluraj jardekoj de la pasinta jarcento.

La katalogo estas farita surbaze de la plurjara registra laboro, iniciatita de norvega esperantisto Tom Arbo Hoeg, helpata de aliaj membroj de Norvega Esperanto-Ligo. La rekta ligo al la katalogo estas www.uea.org/dokumentoj/artikoloj. Pli mallonga kaj pli facile memorebla adreso estas www.esperanto.net/artikoloj.

❖ **POLLANDO:** La 13-an de januaro 2006 kunsidis en Bjalistoko la Konsilantaro de la Fondumo Zamenhof, dum kiu estis elektita ties nova estraro: Jaroslaw Parzysek (prezidanto), Nina Pietuchowska (sekretario) kaj Povilas Jegorovas (estrarano). La 17-an de februaro okazis la unua kunsido de la novelektita estraro. Antaŭ la kunsido Jaroslaw Parzysek, Povilas Jegorovas kaj la prezidantino de la Konsilantaro de Fondumo Zamenhof prof. Hanna Konopka vizitis la eŭrodeputiton kaj rektoron de la Bjalistoka Supera Altlernejo prof. Barbara Kudrycka kaj pridiskutis kunlaboron. Jaroslaw Parzysek kaj Povilas Jegorovas vizitis la vicurbestron de Bjalistoko Krzysztof Sawicki. Estis pritraktitaj riparoj de la nuna sidejo fare de la urbo kaj transdono de plua domo por la Fondumo Zamenhof. Dum la kunsido, kiun partoprenis ankaŭ la prezidantino de Bjalistoka Esperantista Societo Elzbieta Karczewska, estis lanĉita la ideo organizi la 94-an Universalan Kongreson de Esperanto en 2009 (150 jaroj post la naskiĝo de L.L. Zamenhof) en Bjalistoko.

Povilas Jegorovas

❖ **FRANCIO:** Gratulenda iniciato arigis, okaze de la Semajno de Internacia Amikeco, 30 parizregionajn esperantistojn, plejparte kunlaborintojn/antojn de la sidejo de UFE – Unuiĝo Franca por Esperantistoj (la tegmenta organizaĵo de la francaj esperantistoj). Ĉiu partoprenanto ricevis Karton de Amikeco. Post komuna tagmanĝo, lifto portis la grupon sur la Montparnasan Turon. El la fermita 56-a etaĝo la grupo observis la parizan pejzaĝon. Per plua trietaĝa ŝtuparo la grupo atingis la 59-an etaĝon kaj spertis – tre fortan venton.

Luiza Marin



❖ **ITALIO:** La 19-an de decembro 2005, ĉe Instituto Pontano en Napolo, la kursejo de UTESPED (Eksperimenta Pormaljunula Universitato Malcentrita) okazis prelego pri Lingvaj Rajtoj, kadre de la Esperanto-kursoj, enprogramiitaj en la universitata studplano. Ĉefprelegis pri la temo inĝ. Ranieri Clerici, vicprezidanto de Itala Esperanto-Federacio, akompanate de intervenoj de la E-docento Nicolino Rossi kaj Alessandro Sarno, konsiliano de IEF. Inĝ. Clerici verve substrekis la neceson de klara kaj sendiskriminacia lingva komunikado en la hodiaŭa mondo, kie diversaj lingvaj sistemoj kutime uzatas ĉe internaciaj institucioj kaj kunvenoj. Nicolino Rossi enfokusigis la atenton al la streboj de L.L. Zamenhof, kaj Alessandro Sarno altiris la atenton de la spektantoj al la nuntempa uzo de Esperanto ĉe gejunuloj. Napola E-Asocio, kunlabore kun UTESPED, aranĝis ekspozicion en la prelegaŭditorio Pontano, pri afiŝoj de Universalaj Kongresoj, naciaj E-kongresoj kaj la 100-jara datreveno de la unua UK en Bulonjo-ĉe-Mar.

Nikolino Rossi

❖ **ĈINIO:** La 27-a de februaro 2006 estos neforgesebla tago por la monda E-movado. LEA – Liaoning-provinca Esperanto-Asocio kaj Liaoning-provinca Instrua Instituto de Fremdlandaj Lingvoj por Altlernejoj funkciigis kurson de Esperanto-Historio en la Historia kaj Kultura Instituto de Liaoning-Universitato. 52 geinstruistoj (profesoroj kaj docentoj) el la fremdlandaj lingvaj institutoj (fakultatoj) de pli ol 20 altlernejoj en la provinco anoncis sin por la kurso. La lernolibro adoptita en la kurso estis la ĵus eldonita libro *Esperanto-Historio*, kompilita de Liu Zhengkun, prezidanto de LEA kaj profesoro de la universitato, kaj

Song Yunsheng, honora prezidanto de LEA. La instruistoj lernos Esperanton en kroma kurso kaj sisteme lernos la evoluan historion de Esperanto. LEA tiel celas baki amason da kvalitaj altlernejoj Esperanto-instruistoj. La saman tagon 85 gestudentoj elektis Esperanton kiel nedevegitan studobjekton kaj eklernis en du kursoj en la universitato. Por montri la vastecon kaj internaciecon de Esperanto, LEA kolektas reagojn (gratulojn, instigojn, proponojn) kaj sekve kompilos bultenon, dissendotan al instancoj de la provinca kaj urbaj registaroj kaj la estroj de la altlernejoj. La korespondadreso: Wu Guojiang, Fushun Shiyouyichang Yanjiusuo, CN-113008 Fushun, Liaoning, Ĉinio. Rete: ghemelurboj@yahoo.com.cn ; amikeco999@21cn.com.

❖ **HISPANIO:** La 3-an de marto 2006, okaze de la inaŭguro de la Esperanta kurso en la Universitato de Oviedo, Astura Esperanto-Asocio transdonis al la universitata biblioteko ekzempleron de la ĉefverko de Cervantes *Don Kihoto* en Esperanto. La suba foto montras la eventon: Profesoro Carlos Enrique Carleos Artime (maldekstre), membro el la estraro de Astura Esperanto-Asocio; d-rino María José Álvarez Faedo, Katedra profesorino pri filologio (apud li), ambaŭ gvidantoj de la Kurso de Esperanto kiu komenciĝis la saman tagon en tiu Universitato de Oviedo, transdonis la libron al la Vicrektorino de la Universitato, Margarita Fuente Noriega, kaj al la direktoro de la Biblioteko de la Universitato, Profesoro Ramón Rodríguez Álvarez. La prezentado de la evento estis farita de profesoro Luis Valdes Pelaez (dekstre), direktoro de la katedro „Jovellanos“ de Universitata Disvastigo, institucio en kiu estas enkadrigita Astura Esperanto-Asocio.

Santiago Mulas Gallego



DUMVIVAJ MEMBROJ

Germanio: C. Matthias. Japanio: K. Deguti.

PATRONOJ DE TEJO

Aŭstralio: J. Bishop, H. Green. Germanio: F. Knöferl. Italio: V. Spina. Japanio: K. Hosomi, K. Kai, U. Kobayasi, S. Simada. Nederlando: S. Idzerda, F. J. Pieterse. Norvegio: D. Draper.

SOCIETO ZAMENHOF

Aŭstralio: K. Enderby. Brazilo: M. Borges dos Santos, J. Dias Pinto, A. Rabêlo. Bulgario: O. Gerasimova. Ĉinio: Tan Xiuzhu, Wang Fang, Wang Jing Rong, Wang Xue, Zhao Jianping. Finnlando: A-L. Heikkinen. Germanio: E. Blasius, M. Börder, H. Erhard, H. Klünder, A. Putze, M. Scherm, H. Schindler, C. Trésorier, H. Welger. Hispanio: J. Castelltort

i Riba. Japanio: K. Hosomi, Y. Kuroyanagi, S. Simada, K. Simizu, S. Yamasaki. Kazaĥio: L. Aleksenko, D. Baradosova. Litovio: P. Jegorovas. Nederlando: P. H. Damsté. Svedio: E. Castell, S. Fritz, L. Holmlund, M. Häggström. Svislando: B. Graf, S. Kaufmann. Usono: Lucille & William Harmon.

DONACOJ

Ĝis la 1-a de marto 2006

Konto Afriko: Brazilo: R. Conde 75,66. Francio: A. Nonima 50,00. Nederlando: C. & R. Bossong 25,00. *Sumo ĉi-jara:* 275,84.

Fondaĵo Azio: Japanio: K. Hayasi, T. Tadaisi – po 14,17. *Sumo ĉi-jara:* 494,32.

Konto Novjorka Oficejo: Aŭstralio: O.

Lonerangan 19,00.

Sumo ĉi-jara: 19,00.

Fondaĵo Canuto: Nederlando: R. Moerbeek 12,80; A. & H. Bakker 1000,00; R. Schmeits 2,89. *Sumo ĉi-jara:* 3395,95.

Fondaĵo Espero: Finnlando: K. Liimatainen 22,00. Nederlando: R. Moerbeek 230,00; A. & H. Bakker 404,00. Pollando: I. Koutny 25,00. *Sumo ĉi-jara:* 681,00.

Konto Hans: Nederlando: R. Balk 50,00. *Sumo ĉi-jara:* 50,00.

Domrenovigo: Nederlando: A. & H. Bakker (Biblioteko) 2000,00. *Sumo ĉi-jara:* 2000,00.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Afrika Oficejo kun nova teamo en nova ejo

Komence de marto eklaboris la nova teamo de la Afrika Oficejo de UEA en Lokosao, Benino, kie tiu ĉi agadcentro nun troviĝas en duĉambra ejo.

Meze de marto estis jam preskaŭ finitaj la preparoj por certigi la necesajn teknikajn kondiĉojn por glata funkciado de la oficejo. Komplete nova la teamo ne estas, ĉar unu el la dungitoj, la juna togolanda juristo Raoul Hounnake, estas fakte veterano, kiu garantias kontinuecon en la funkciado de la Afrika Oficejo. Li laboris ankaŭ en la antaŭa sidejo de AO en Lomeo, Togolando, ekde 2000 ĝis la fino de 2004. En 1999 li laboris ses monatojn kiel volontulo en la Centra Oficejo de UEA spertigante pri administrado kaj la tutmonda movado por poste eklabori en la Afrika Oficejo, kies starigo tiam estis planata. Samjare li partoprenis ankaŭ en la Universala Kongreso en Berlino. Li do nature estas nun la ĉefa oficisto de AO, kun la benina aktivulo Zinkpe Benoît kiel sia talenta kolego.

Kvankam nova kiel oficisto, Zinkpe Benoît havas 20-jaran sperton pri movada aktivado. Raoul Hounnake parte laboras hejme en Lomeo, dum Zinkpe Benoît deĵoras tuttempe en la oficejo en Lokosao. Ambaŭ afrikaj oficistoj de UEA respondecas rekte al la ĝenerala direktoro Osmo Buller. Ili estas en regula kontakto ankaŭ kun prezidanto Renato Corsetti kaj kun Jean Codjo, la kunordiganto de la Afrika Komisiono de UEA. Granda avantaĝo estas, ke la TEJO-estrarano pri afrika agado, François Hounsounou, loĝas en Lokosao kaj povas praktike ĉiutage helpi en la funkciado de la oficejo kaj asisti per konsiloj la dungitojn kaj la ĝeneralan direktoron. Krome, jam tradicie la Afrika Oficejo havas fidelajn kunlaborantojn ankaŭ ekster Afriko, kiuj gvidas komencantajn kaj progresantajn lernantojn de Esperanto. Informado pri Esperanto kaj organizado de instruado daŭre havas altan prioritaton en la oficeja taskaro, sed AO havas ŝlosilan rolon ankaŭ kiel plenumanto de la planoj kaj decidoj de la Afrika Komisiono de UEA. Pri la agado de AO kaj de la afrika Esperanto-movado ĝenerale oni povos informiĝi per la bulteno „Esperanto en Afriko“ (antaŭe „TrAfrik“), kiun AO redaktas.

UEA kovras la salajrojn kaj oficejajn kostojn de AO el sia ĝenerala buĝeto. La



elspezoj por informado kaj instruado kaj por subteno de afrikaj landaj asocioj kaj lokaj kluboj estas financataj el Fondaĵo Afriko, kies rimedoj konsistas ĉefe el donacoj de solidaraj esperantistoj. Interesiĝantoj pri Esperanto ne mankas en Afriko. La kapabla teamo de la Afrika Oficejo estas plena de entuziasmo por kontentigi la petojn de siaj lernemaj samkontinentanoj. Mondonacoj al Fondaĵo Afriko estas tre bonvenaj por ebligi tiun laboron, sed bonvenas ankaŭ lernomaterialoj. La mondonacojn oni sendu al la Centra Oficejo en Roterdamo, dum lernilojn oni povas sendi rekte al:

Afrika Oficejo de UEA, BP 416, Lokossa-Mono, Respubliko Benino.

UEA ankaŭ petas, ke eldonantoj de Esperanto-gazetoj aldonu AO al siaj senpagaj ricevantoj. La retadreso de AO estas: *afrika.oficejo@uea.org*.



Verda turismo en Himalajoj

En la suda parto de Azio, en Himalaja montaro, inter Hinda Unio kaj Tibeto, situas fascina lando kun antikva historio, majestaj pejzaĝoj kaj la mondfama monto Everesto – Nepalo. Esperanto havas tie fortajn radikojn. La kursojn tie iam gvidis la konata mondvojaĝanto Tibor Sekelj, poste Simo Milojević kaj Joachim Werdin.



La 6-an Internacian Himalajan Renkontiĝon okazigis Nepala Esperanto-Asocio de la 26-a de februaro ĝis la 10-a de marto 2006. Malgraŭ oficialaj malrekomendoj en multaj landoj viziti nuntempe Nepalon, venis dudek kvar esperantistoj: ok japanoj, tri nederlandanoj, unu germano kaj dek du nepalanoj.

Dum la ekscita flosado sur la rapidega rivero Trishuli, semajna piedvagado ĉirkaŭ la Himalaja regiono ĝis la sanktejo Muktinath, kiu situas en la alteco de ĉirkaŭ kvar mil metroj, la partoprenantoj amike babiladis pri diversaj temoj kaj vizitis kelkajn historiajn palacojn kaj templojn de la Katmandua valo. La evento finiĝis per amuza kunmangado en la ĉefurbo Katmanduo.

La renkontiĝo donis la ŝancon diskonigi la lokan movadon al internacia areno, sed donis egale gravan ŝancon al nepalanoj praktiki Esperanton, diskuti pri la loka movado kaj lerni pri tiu en diversaj landoj. La Internaciaj Himalajaj Renkontiĝoj okazas en Nepalo ekde 1995.

Razen Manandhar

Esperanto en la Muzea Nokto de Roterdamo

Inter la 4-a kaj 5-a de marto 2006 okazis la kvina Muzea Nokto de Roterdamo, dum kiu muzeoj, artgalerioj k.a. estis malfermitaj ĝis la 2-a horo nokte.

La hispana artisto David Maroto, loĝanta en Roterdamo, malfermis tiam ekspozicion de skulptaĵoj kaj instalaĵoj kiel la lastan, kvaran parton de sia artprojekto “Dua Cirklo/Ludreguloj”. La lasta parto, “Cul de sac” (“Senelirejo”), temis pri la maleblo komunikiĝi. Kadre de tiu temo okazis kvizo, por kies realigo Maroto petis helpon de la Centra Oficejo de UEA.

Pere de la CO ekestis kunlaboro inter Maroto kaj Francisco Veuthey (sur la suba foto), el kiu rezultis programero, dum kiu Veuthey legis fragmentojn el la romano *La inventaĵo de Morel* de la argentina verkisto Adolfo Bioy Casares, kiujn li esperantigis laŭ peto de Maroto. La centkapa publiko devis diveni, en kiu lingvo okazas la legado kaj pri kiu verko temas. La legado daŭris



Tradicia litovia librofoiro

De la 23-a ĝis la 26-a de februaro 2006 sukcese pasis en la ĉefa litovia ekspozicia centro LITEXPO la 7-a Internacia Librofoiro kaj vica Baltia Librofoiro, kiun partoprenis 375 kompanioj el 11 landoj.



Foto: Choe Taesok

Dum la kvar tagoj la librofoiron vizitis rekorda kvanto – pli ol 55 mil vizitantoj. Kun siaj 236 diversaj kulturaj aranĝoj la librofoiro fariĝis la plej populara jara kulturaranĝo en Litovio.

La trian fojon la librofoiron oficiale partoprenis ankaŭ Litova Esperanto-Asocio, kiu havis konstante funkciantan budon/

standon sur areo de 7,5 kvadrataj metroj. Estis ekspoziciataj kaj vendataj kelkaj dekoj de libroj en la litova kaj en Esperanto, kiuj estis dum la lastaj jaroj eldonitaj fare de diversaj litovaj eldonejoj, kunlabore kun Litova Esperanto-Asocio. Ekspoziciataj estis ankaŭ libroj de „Sezonoj“ kaj de aliaj eksterlandaj eldonejoj. Ĉe la stando de LEA konstante deĵoris kelkaj esperantistoj, klarigis al vizitantoj pri Esperanto, libroeldonado, vendis librojn, disdonis faldfoliojn kaj kartetojn pri Esperanto, speciale presitajn por la librofoiro.

La partopreno havis grandan informan kaj propagandan efikon. La standon de LEA vizitis la ĉefministro de Litovio Algirdas Brazauskas, kiu interesiĝis pri la stato de Esperanto en Litovio, kaj la ministro de kulturo de Litovio Vladimiras Prudnikovas. La 25-an de februaro en unu el la konferencaj salonoj okazis prezento de novaj Esperanto-libroj. LEA prezentis lastatempe eldonitajn librojn en Esperanto kaj en la litova, eldonitajn okaze de la Universala Kongreso de Esperanto en Vilno. Al la prezento de tiuj libroj venis la ĝenerala sekretario de litova nacia Unesko-komisiono Asta Dirmaitė. LEA estis prezentita en la katalogo de la librofoiro kaj en la programo de kulturaj eventoj, kie estis priskribita la libro de Henri Masson kaj René Centassi pri L.L. Zamenhof *Homo, kiu defiis Babelon* kun foto de unu el la aŭtoroj. La librofoiro estis vaste prezentita en la litovaj gazetararo, radioj kaj televido, kie oni menciadis ankaŭ partoprenon de LEA. La ĉefan laboron por la librofoiro faris la sekretariino Irena Alijošiūtė, la nova redaktoro de *Litova stelo* Vytautas Šilas, kontribuis ankaŭ Petras Kazėnas, Tatjana Siliėnė, Jolanta Dudėnaitė, Olga Strojėva, Olga Baškir, Dziugas Gedvilas, Valdas Banaitis, Emilija Rapkevičiute, Gražina Opulskienė, Silvija Sinkevičiūtė, Diemantė Aniėienė kaj aliaj vilnaj esperantistoj.

Povilas Jegorovas

pli ol tri minutojn, ĝis aperis la ĝusta respondo post la unue proponitaj itala, latina, korsika, retoromanĉa, portugala kaj rumana. Kelkaj pliaj minutoj kun helpaj sugestoj de la kvizestro necesis, ĝis iu divenis la nomon de la romano.

La diveninto de la lingvo estis premiita per disko de la grupo „Kaj tiel plu“ kun mezepokeca muziko, dum la diveninto de la romano ricevis ĝian anglan eldonon. La tuta aranĝo estis filmita kaj la filmo prezentita en la oficiala inaŭguro de la ekspozicio la 9-an de marto, kie la kvizo pri lingvo kaj verko estis ripetita en ĉeesto de kelkdeko da homoj, ĉefe artistoj. Oni montras la filmon ankaŭ en la Malferma Tago de la CO la 13-an de majo.

En 1997 Francisco Veuthey renkontiĝis kun la verkisto Bioy Casares (1914-1999) en Roterdamo (vd. *Esperanto* 1997:7-8, p.138). Tiam Veuthey demandis la faman aŭtoron de fantastaj rakontoj pri lia sinteno al Esperanto. Li respondis: „Ĉiam ŝajnis al mi bona la ideo pri internacia lingvo. Esperanto havas mian plenan aprobon, kvankam mi neniam inkludigis ĝin aŭ menciis ĝin en miaj verkoj simple pro tio, ke mi ne konas ĝin kaj neniam studis ĝin.“

Osmo Buller

„Miaj kripoj“ en Triesto

Triesta Esperanto-Asocio en Italio fine de la jaro 2005 aranĝis ekspozicion „Miaj kripoj“. Ĝi konsistis el du partoj: la konkursa kun la verkoj de infanoj en la aĝo ĝis 15 jaroj, kaj la nekonkursa, kun la prezento de la kristnaskaj kripoj el diversaj partoj de la mondo.

La nekonkursa parto okazis jam la trian fojon. Akompanis ĝin kvar prelegoj pri la kristnaskaj kripoj, prezentitaj de Giuseppe Castagnaro, prezidanto de la Asocio „Amikoj de kripoj“ de Triesto, Edvige Ackermann, prezidanto de Triesta Esperanto-Asocio, kaj Marija Belošević, sekretariino de Kroata Esperantista Unuiĝo.

La ideo aranĝi la ekspozicion venis pro la deziro revoki la memorojn pri la okazintaĵoj ligitaj kun la kristanaj tradicioj. Al la konkurso alvenis 78 laboraĵoj el Ĉeĥio, Francio, Italio, Kroatio, Litovio kaj Pollando, de infanoj en la aĝo de 6 ĝis 14 jaroj. La ekspozicio estis solene inaŭgurita la 13-an de decembro kaj daŭris ĝis la 6-a de januaro. Dum la inaŭguro la

plej junaj membroj de Kroata Esperantista Unuiĝo kantis kroatajn kristnaskajn kantojn en la kroata kaj Esperanto.

La vizitantoj per voĉdonado elektis la plej bonajn verkojn, kiuj estis premiitaj.

Marija Belošević

Sur la foto: la plej junaj aŭtoroj de la kripoj, lernantoj de Esperanto el la 3-a klaso de la bazlernejo en Medvedgrad.



84 englutitaj de la milito. Kion faros IEL sen la tiurilataj kotizoj kaj aliaj enspezoj?

D-ro Lapenna, kiu ne estis granda amiko de Tiny, tamen skribis pri li en la libro *Esperanto en perspektivo*: „Eĉ dum la milito Goldsmith sukcesis gvidi la Ligon sendeficite.” Do, la movado ne mortis kaj la aktivema Tiny ne malŝparis sian tempon. Jam komence de la milito li invitis BEA reinstaliĝi en la kamparo for de Londono, la verŝajne bombota ĉefurbo. BEA akceptis la inviton, kaj ĝia sekretario Ronald Wilkinson transloĝiĝis al Heronsgate. Ekde 1940 tiu ĉi tamen devis servi kiel soldato en la brita flugarmeo. Tiny kaj Eileen trovis sin laborantaj ne nur por IEL kaj EPC, sed ankaŭ por BEA. Dum tiu tempo la revuo de IEL – titolita *Esperanto Internacia* – kaj *The British Esperantist* aperis, ambaŭ, en alternaj monatoj po sesfoje jare. Kaj ĉiuj eldonaĵoj – EL, BE kaj la *Jarlibro* – aperis ĉiam akurate laŭ lia reĝimo.

En 1947 IEL kaj UEA denove kunfandiĝis kaj adoptis sian malnovan nomon UEA.

La Centra Oficejo 1951-1955

En la aŭtuno de 1951 Goldsmith invitis min konsideri dungigon. La tiama oficistaro konsistis el Tiny, lia filino Eileen, kaj unu lerta knabino el la vilaĝo, kiu ne nur lernis kiel paki librojn, sed ankaŭ rapidege lernis Esperanton. Do, estis klare al mi, ke Tiny serĉas iun, kiu transprenos de li kiam li emeritiĝos post tri jaroj. Ankaŭ mia juna edzino tiutempa povis esti dungita (kiel steno-tajpistino), por tiumaniere liberigi Eileen kiu, nature, preferis labori kun sia edzo en ilia floranta presejo en la apuda vilaĝo.

Ekde la 1-a de decembro 1951 mi laboris kun Tiny en la administrejo; ĉefe temis pri librotenado, kontrolo plus enskribo de spezfolioj de la ĉefdelegitoj, tajpado de tekstoj por la revuo, la *Jarlibro* (en tiuj tagoj du-partaj) kaj aliaj eldonaĵoj, rilatoj kun la presejo kaj kontrolo de la presprovaĵoj. Mia edzino akompanis la knabinon Shirley en la libroservo, kaj tie tajpis leterojn diktatajn de Tiny.

La oficeja ekipaĵo estis minimuma: du skribmaŝinoj, unu telefono, unu multobligilo (kompreneble funkciigenda permane), kaj unu adresmaŝino kun ties necesaj stencilokliŝoj; bindiloj por la membrofolioj kaj membroslipoj; kompreneble neniu kalkulilo por la fakturado kaj librotenado; klasikaj kaslibroj kaj ĉeflibroj malgraŭ kompleksaj kontoj kun notoj en pli ol 10 fremdaj valutoj. Ĉiujn adiciojn, ĉiujn kalkulojn oni plenumis, kompreneble, per la kapo. Neniu revis pri komputiloj en tiuj tagoj.

1954-1955

Tiny emeritiĝis en novembro 1954. Mi fariĝis ĝenerala sekretario laŭ la tiama Statuto kaj mi, tiam 27-jara, esperis ricevi iom da subteno kaj kuraĝigo de la prezidanto Malmgren, sed tion mi bedaŭrinde ne ricevis. La vintra sezono ĉe la CO estas signalo (espereble) por enfluo de kotizoj el ĉiu angulo de la terglobo, kaj de spezfolioj de la ĉefdelegitoj kaj perantoj. Mi ankoraŭ ne komprenas kial en tiuj tagoj la prezidanto plagis min per postuloj kaj demandoj pri detaloj, tiel ke mi devis pasigi vesperojn kaj noktojn verkante al li klarigojn kaj finfine protestojn. Mi decidis ekŝigi kaj donis plurmonatan averton pri mia foriro.

Samtempe, sendube kun la kuraĝigo de d-ro Lapenna, Malmgren estis preparanta proponon por nova Statuto. Unu el ĝiaj ĉefaj celoj estis ŝanĝi la titolon de la oficeja administranto por ke la ĝenerala sekretario povu esti estrarano, kaj oni povu asigni tiun titolon al d-ro Lapenna.

Domo: ĝia vendo (1956)

Malfrue en 1955 UEA decidis transloki la sidejon al Rotterdamo kaj negocis por vendi la domon en Heronsgate. Vi memoras, ke laŭ la katastro, la domo apartenis al Goldsmith kaj Oliver kiel kuratoroj por IEL/UEA. Absolute nenie troviĝis mencio de la arango kun BEA, nek en la registrodokumentoj nek en protokoloj de kunvenoj. Kun la preterpaso de dudek jaroj (1936-1956) kaj la morto de kelkaj komitatanoj, oni forgesis pri la arango, kiu laŭleĝe ne havis ekziston. Sed morale jes. Mi citas el letero de Arturo Oliver sub dato novembro 1999:

„Tiny kaj mi rifuzis subskribi la vendodokumentojn, kaj la reago de la tiamaj estraranoj estis neforgesebla kaj preskaŭ neprikscribebla. Kompreneble, ĉar en la aĉetodokumentoj kaj kadaŝtroregistro mankis ajna mencio de la morala ŝuldo al BEA, kiu restis nur en la konsci[enc]o de malmultaj samideanoj. UEA estus povinta finfine per leĝa proceso devigi nin subskribi, sed la Estraro anstataŭe akceptis sugeston ke ili faru mondonacon al BEA (kies sumon mi forgesis) interŝanĝe kontraŭ letero de BEA deklaranta ke ĝi havas nenian pluan intereson je la domo en Heronsgate“.

Fino de la historio pri la domo. Sed permesu ankoraŭ kelkajn vortojn pri Tiny. Kiam li emeritiĝis en 1954, la Estraro dece proponis al la Komitato, ke li estu nomita honora membro de UEA, kaj cirkuligis belan laŭdan biografion pri lia tutviva laborego por Esperanto. Sed lastmomente Tiny rifuzis tiun honoron, sekve de ne tre bone kaŝitaj akuzoj kontraŭ li kaj la familio fare de eminentaj UEA-roluloj en tiu epoko. Sed li neniel ĉesis labori por Esperanto. En 1964 „li translokiĝis al Aŭstralio, kie li daŭrigis sian energian agadon por Esperanto tra multaj pliaj jaroj” (Tonkin). En 1972 li tie mortis ekzakte ĉe la fino de sia lasta publika prelego pri la internacia lingvo.


Johano Rapley

Prelego ĉe la Malferma Tago de la CO en Rotterdamo, la 26-an de novembro 2005

VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE
NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM

MALFERMA TAGO

sabaton la 13-an de majo 2006 (10h00 - 17h00)



- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Specialaj ofertoj

Speciala gasto:
STEFAN MAUL



- ★ Bazaro de e-aĵoj
- ★ Senpaga loterio
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj

UK en la ombro de Davido



Glumarkoj (4x5cm) por la venontjara UK pretas. 12-peca folio kostas €1,20. Triona rabato ekde tri folioj. Mendebla ĉe la Libroservo de UEA.



Ĉiu kongresano en Florenco 2006 ne maltrafu unikan ŝancon. Legu antaŭe atentokaptan verketon pri la plej fama Florencano: *Dante Alighieri*. Du itineroj tra lia vivparabolo kaj lia politika, kultura kaj etika pensmaniero.

DANTESKAJ ITINEROJ de Vittorio Russo. Elitaligis kaj redaktis Nicolino Rossi. Fragmentojel *Dia Komedio*, *Rimjo*,

Vivo Nova en versaj esperantigoj de E. Dondi, K. Kalocsay kaj N. Rossi. Eldonis: Napola E-Asocio, Napolo 2001. 88p. Prezo: € 9,30.

MALMULTEKOSTA VOJAĜADO

La plej populara eldonaĵo de TEJO, la listo de esperantistaj gastigantoj **Pasporta Servo**, aperas ekde 1974. La nova eldono de 2006 enhavas 1392 adresojn en 92 landoj, sur 186 paĝoj.



La gastigantoj ricevas ĝin senpage. La aliaj povas mendi ĝin kontraŭ 15 EUR + sendokostoj (kun triona rabato ekde tri ekz.) ĉe la Libroservo de UEA.

Por aliĝi kiel gastiganto, petu aliĝilon de UEA, de la kompilinto aŭ de la landaj organizantoj.

Pliaj informoj ĉe la kompilinto: Derk Ederveen, Westenburgstr. 15, NL-2275 XR Voorburg, Nederlando, paspsserv@wxs.nl, aŭ ĉe: www.esperanto.net/ps.

KONTAKTO kun la mondo!



KONTAKTO estas la plej vaste legata junuleca revuo pri landoj, popoloj, kulturoj, socio kaj politiko – por gejunuloj kaj ĉiuj kiuj estas junaj en la koro.

KONTAKTO aparte taŭgas por instruistoj kaj komencantoj: parto de la artikoloj aperas en la lingvaĵoj "facila" kaj "tre facila". **KONTAKTO** estas varia kaj amuza – interesa por ĉiuj!

KONTAKTO aperas 6-foje jare. Abonu rekte de UEA aŭ pere de via kotizperanto.

ABONTARIFO 2006

Aŭstralio	34 dolaroj	Francio	22 eŭroj	Nederlando	22 eŭroj
Aŭstrio	22 eŭroj	Germanio	22 eŭroj	Norvegio	165 kronoj
Belgio	22 eŭroj	Hispanio	22 eŭroj	Pollando	45 zlotoj
Brazilo	10 eŭroj	Israelo	16 eŭroj	Portugallio	22 eŭroj
Britio	14 pundoj	Italio	22 eŭroj	Svedio	200 kronoj
Danio	160 kronoj	Japanio	2700 enoj	Svislando	31 frankoj
Finnlando	22 eŭroj	Kanado	31 dolaroj	Usono	23 dolaroj

Granda rabato por grupaj abonon ekde ses ekzempleroj. Informiĝu!



ETA VIVO. Clelia Conterno Guglielminetti (1915-1984). Poezia rikolto el la jaroj 1935-1969. La Laguna: J. Régulo, 1969. 134p. 19cm. Serio "Beletraj Kajeroj", n-ro 37. Prezo: €2,40. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

Italaj Aŭtoroj

LA LIBRO DE LA MIRINDAĴOJ. Marko Polo (1225-1324). Esperantigis Daniel Moirand. Rotterdam: UEA, 2001. 445p. 21cm. Ilus. Serio "Oriento-Okcidento", n-ro 34. Prezo: € 33,00. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.



ENKONDUKO AL DEMOKRATIO



Du elstaraj britaj fakuloj klarigas en ĉi tiu gvidilo de Unesko okdek el la plej premaj demandoj pri la esenco, celoj kaj funkciado de demokratio. La demandoj estas aranĝitaj en ses sekcioj: bazaj konceptoj kaj principoj; liberaj kaj justaj elektoj; malferma kaj respondeca regado; rajtoj de unuopuloj kaj

ilia defendado; demokratia socio; la estonteco de demokratio. Bonega kaj klara enkonduko en la plej gravan politikan koncepton, uzebla kiel lernolibro aŭ baza konsultlibro. Bela grafika vesto kun spritaj ilustraĵoj de Plantu, ĉef-desegnisto de la franca ĵurnalo *Le Monde*.

KIO ESTAS DEMOKRATIO? 80 demandoj kaj respondoj. David Beetham kaj Kevin Boyle. Ilus. Plantu. El la angla trad. Geoffrey Sutton. Rotterdam: UEA, 2000. 143p. ISBN 92 9017 066 2. 21cm. Prezo: € 9,90. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

RESPONDOJ PRI RASISMO

"Infano estas scivolema. Ĝi faras multajn demandojn kaj ĝi atendas precizajn kaj konvinkajn respondojn. Per ĉi tiu libro mi provas respondi la demandojn de mia filino. Ĝi celas la infanojn kiuj ankoraŭ ne havas antaŭjuĝojn kaj volas kompreni. Pri la plenkreskuloj, kiuj ĝin legos, mi esperas ke ĝi helpos ilin respondi la demandojn, pli embarasajn ol ni kredas, de siaj propraj infanoj." (Tahar Ben Jelloun)


Tiu ĉi libro de la Marok-devena aŭtoro enorme furoris en Francio. En 1987 Tahar Ben Jelloun gajnis la prestiĝan Premion Goncourt.



PAĈJO, KIO ESTAS RASISMO? Tahar Ben Jelloun (1944). El la franca trad. Armela LeQuint kaj Ĵak Le Puil. Rotterdam: UEA, 1999. 52p. ISBN 92 9017 063 8. 19cm. Prezo: € 6,30. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

GVIDILO PRI HOMAJ RAJTOJ


Okaze de la 50-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj UEA eldonis tiun ĉi lernolibron de Unesko pri homaj rajtoj, aperintan antaŭe jam en 16 aliaj lingvoj. Leah Levin estas brita fakulo pri homaj rajtoj. La unua parto de ŝia libro priskribas la internacian juron pri homaj rajtoj, kun multa atento al la evoluo de la proceduroj por protekti homajn rajtojn kaj al la hom-rajta edukado. La dua parto klarigas la enhavon kaj signifon de ĉiu artikolo de la Universala Deklaracio. La modele tradukita kaj bele eldonita libro estas ilustrita de Plantu, fama franca karikaturisto.



HOMAJ RAJTOJ: DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ. Leah Levin. Ilus. Plantu. El la angla trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 1998. 140p. ISBN 92 9017 058 1. 21cm. Prezo: € 9,90. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.

DEFENDILO PRI ESPERANTO

Lernu el tiu ĉi DISKUTLIBRO POR MALPLI UZATAJ LINGVOJ unue eldonita de la Eŭropa Buroo por Malpli Uzataj Lingvoj.



Diskutlibro pri malpli uzataj lingvoj de Jordi Bañeres kaj Miquel Strubell. Trad. Edmund Grimley Evans. Rotterdam: UEA, 2002. 59p. 22cm. ISBN 92 9017 081 6. Prezo: € 7,50. Triona rabato ekde tri ekzempleroj.